

IL POPOLO CINQUE

中國報通

12 1986





En vintro Foto de ÚANG DEJING

Enhavo

Sport-kunveno ĉe la piedo de Tjanŝan-montaro	2
Vojaĝo en malriĉaj lokoj de Ningŝja	10
Antaŭ 20 jaroj kaj hodiaŭ	14
Vojaĝo en Fuĝjan (II)	57
Post la bankroto de entrepreno	17
Ciateoj travivintaj 400 milionojn da jaroj (Bildoserio)	8
Esp-movado en la nuna Ĉinio	21
Bona komenco de la kombino de Esperanto kun sciencoj kaj tekniko	23
Agrabla renkontiĝo	26
Pri nia sperto	29
POR KOMENCANTOJ: Germana frezisto	30
ESP-NOVAĴOJ	42
La arkitekturo de kioskoj (Bildoserio)	32
Doktoro Fang Ĉji	40
Antikvaj surrokaj bildoj de Ĉinio	64
ĈINA LITERATURO:	
Ora tempo por prozo (I)	44
Admonado de Zoŭ Ĝji al la reĝo Ŭejŭang de Ĉji pri akcepto de kritiko	46
Du poemoj: La printempo; Pluvema soneto	48
POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (VI)	49
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Famaj budhismaj montoj de Ĉinio	50
EL REALA VIVO DE ĈINIO: En Bejhaj-parko	36
AMUZO	56
KURANTAJ AFEROJ	53
SUR LA KOVRILO: Baskulludo de koreoj	Foto de SEN ĈEN
INTERNE DE LA KOVRILO: En vintro	Foto de ŬANG DEJING
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Bronza vazo kun desegnoj	Foto de HU ĈUJ
SUR LA DORSKOVRILO: En frosta loko (Ĉinstila pentraĵo)	de ŜI JIGONG

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50					

SPORT-KUNVENO ĈE LA PIEDO DE TJANŜAN- MONTARO



Teksto de **GANG ĈINGĜEN**

Fotoj de **ŜEN ĈEN**

Je ekflugo de mil kolomboj kaj leviĝo de dek mil balonoj, la Tria Nacimalplimulta Kunveno de Tradiciaj Sportoj de Ĉinio malfermiĝis en Urumĉi, la ĉefurbo de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

La unua sport-kunveno kun naciecaj sportaj prezentoj kaj konkursoj okazis en Tjanĝin en novembro 1953. Post 29 jaroj la Dua Nacimalplimulta Kunveno de Tradiciaj Sportoj de Ĉinio

Jongbajlan el la sibo-a nacieco de Ŝinĝjang en arkopafado. Ŝi gajnis plej multe da oraj medaloj en la sport-kunveno.



okazis en septembro 1982 en Huhhot, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Pri tio nia gazeto faris detalan raporton en la decembra numero de 1982.

Aŭguste de la kuranta jaro kolektiĝis ĉe la piedo de la bela Tjanŝan-montaro pli ol 700 sportistoj de 55 nacimalplimultoj el 29 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj, tie ili faris konkursojn de ĉevala vetkuro, luktado, arbalesto-pafado, trapezado, ferringo-kapto, surĉevala kapto de kapro kaj arkopafado, kaj prezentadon de pli ol cent sportbranĉoj. La nombro de sportistoj kaj sportbranĉoj kaj la skalo en tiu sport-kunveno superis tiujn de la du antaŭaj.

KONKURSO DE FORTO KAJ SAĜO

La surĉevala kapto de kapro estas interesa konkurso. Apenaŭ finiĝis mallonga fajfado, jam ekleviĝis polvonebulo. 12 rajdistoj sur galopantaj ĉevaloj sin pafis al blanka kapro sen kapo kaj hufoj kaj kun ligita ezofago sur la placocentro. En palpebruma daŭro la plej antaŭa rajdisto atingis la kapron. Li facilmove bridis sian ĉevalon kaj prenis la kapron, sin klinante. La aliaj rajdistoj svarme altorentis kaj konkuris por akiri la kapron.

Tio estas rigardata kiel konkurso de forto kaj saĝo kun forta rivaleco. La partoprenantoj antaŭ la konkurso grupiĝis. Ifoje la konkurso okazas inter du teamoj. La membroj de ĉiu teamo havas malsamajn taskojn sturmi la rivalan sieĝon por kapti la kapron, ŝirmi la kapro-kaptanton en forkurado, aŭ kuratingi aŭ bari lin. La konkurso postulas lertan taktikon. Kiam iu rajdisto kaptis la kapron, iuj el liaj kamaradoj tuj tiras la bridon

antaŭe, aliaj vipas la ĉevalon malantaŭe kaj defendas lin ambaŭflanke, por ke la kapro-kaptanto elsieĝiĝu. Tio postulas kaj individuan lertecon kaj kolektivajn kunlaboron. Kiu teamo ĵetas la kapron en la difinitan lokon ambaŭflanke de la ludkampo, gajnas unu poenton. Kiu gajnis pli da poentoj, tiu estas venkinto. Ĉi-foje la konkurson partoprenis kvar teamoj. Ili estis la teamo de la Interna Mongolio, tiu de Gansu-provinco kaj la unua kaj dua teamoj de Ŝinĝjang. Post ses matĉoj la unua teamo de Ŝinĝjang gajnis la oran medalon.

PREZENTADO DE BRAVULOJ

“Stango-grimpado” estas tradicia aktivado de mjaŭ-oj, kiu okazas unufoje ĉiujare en iuj guberniurboj de Gŭangŝji.

La mjaŭ-a tradicia epopeo “Origino de Stango-grimpado” diras, ke la stango estas starigita memore al la mjaŭ-a heroo Meng Zijoŭ, kiu gvidis mjaŭ-ajn sklavojn en decidema batalo kontraŭ la reakciaj kaj kruelaj sklavo-posedantoj. Post lia martiriĝo oni starigis antaŭ lia tombo altan kaj glitan lignan stangon kun vino kaj viando sur ĝia supro por funebi pri li.

Poste, paro da pli-ol-sepdek-jaraj gemaljunuloj, loĝantaj ĉe la supro de montdeklivo en okcidenta Gŭangŝji, ĉiujare je la 2-a ĝis la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro starigis lignan stangon antaŭ sia domo por kulti la heroon. Foje, la maljunulo promesis al la publiko: Kiu atingos la stangan supron grimpe per la manoj kaj piedoj, tiu estos premiita per vazo da bonkvalita vino. La apudstarantaj junuloj aktive sin anoncis por grimpado. Inter ili estis brava knabo, kiu ambaŭmane kaptis la stangon kun piedoj supren kaj kapo malsupren kaj rapide atingis la stangan supron. La ĉeestantoj nomis lin “stango-grimpa bravulo kun kapo malsupren”. Li ricevis la premion, kaj krome, la knabinoj konsentis, ke li elektos el ili unu plej taŭgan knabinon kiel sian edzinon. Kun tempopaso tio fariĝis konkursa aktivado en tiuj gubernioj.

Ĝiaj tradiciaj grimp-manieroj estas grimpado normala, spirala aŭ tiu kun kapo malsupren. Inter ili la lasta estas la plej malfacila kaj plej laŭdinda. La grimpado estas utila por ekzerci la brakojn, gambojn, lumbon kaj la volon de la ludanto. Tiu aktivado estis plurfoje farata en la lokaj nacimallimultaj kunvenoj de tradiciaj sportoj kaj laŭdata kiel “prezentado de bravuloj” en tiu sportkunveno.



Alatangci kaj ŝia ĉevalo

ĈAMPIONINO-PATRINO KAJ RAJDISTETO


Sur la premio-dona podio staris fortika virino, sur kies sunbruna vizaĝo legiĝis ĝojo de venko kaj iom da hontemo. La anoncisto diris: “La ĉampiono de la 5 000-metra rajdo estas 40-jara sportistino de la Interna Mongolio Alatangci. Ŝi estas patrino de tri infanoj. Ŝia nomo signifas en la hana lingvo Oran Floron...” Eksploziva varma aplaŭdo inter la spektantoj.

Descendinte de la podio, ŝi estis ĉirkaŭita de homoj. Iu kriis: “Gratulon pro via sukceso, per kiu vi glorigas la hejmlokan popolon!”

Ŝia ludo estis eksterordinara. Je la komenco ŝia ĉevalo jam galopis pli antaŭen ol la aliaj. Ŝi forte kaptis la bridon, kun trunko preskaŭ tute tuŝanta la ĉevalan dorson. Ankaŭ ŝia ĉevalo estis neordinara. Ĝi altis 1.66 metrojn, kun dika korpo, grandaj brilaj okuloj kaj olebrilaj kolharoj. Ĝi galopis fluge kaj multe superis la aliajn ĉevalojn.

“Ĉampionino-patrino!” admiris la spektantoj, sekvante la forirantan virinon per la okuloj.

Sur alia ludkampo, je ekfajfo rajdistoj sin pafis antaŭen. Inter ili iu rajdisteto lerte kondukis sian ĉevalon antaŭen kaj frapis la ĉevalan ventron



Sinĝjang-aj sportistinoj ludas rotacian trapezon.

per la piedingo, kun levita kolora vipo en mano kaj trunko klinita sur la ĉevala dorso. Leviĝis ĉie aplaŭdoj de spektantoj por kuraĝigi la rajdisteton.

En la unua tago de la sport-kunveno tiu mongola rajdisteto gajnis la trian lokon de 1 000-metra rajdo. Li nomiĝas Jingmuseĝen, veninta de rasĉeval-bredejo de Ili, Sinĝjang.

Kvankam li estas nur 9-jara, li tamen sin ekzercis longe sur ĉevala dorso kaj estas "veterano" en rajda konkurso. La senlima stepo hardis lian volon kaj havigis al li eminentan rajdarton. Sep-jara, li unuafoje partoprenis en rajda konkurso okazigita de la ĉeval-bredejo kaj gajnis la duan lokon en la konkurso kun pli ol 100 partoprenantoj. En julio lastjare, kiam li partoprenis en la 10 000-metra rajdo de la Rajdkonkurso de Interna Mongolio, sinsekve falis la ventrorimeno de lia ĉevalo kaj iu lia piedingo, de tio mire ekkriis la spektantoj. Sed li ne malrapidigis la galopadon, li prenis la falantan vipon, sin klinante, unumane tenis la kondukrimenon kaj aliamane kunligis la ventrorimeno. En la konkurso li gajnis la kvinan lokon. Deĉevaliĝinte, li ploregis brakumante sian trejniston. Li diris malĝoje: "Mi ja povus gajni pli bonan lokon!"

INTERESA STANGO-PILKADA KONKURSO

"Haj!" je la ekkriego arĝente blanka pilko estis ĵetita alten je dekkelkaj metroj. En la momento, kiam la pilko estis falanta, al ĝi sin

ĵetis ok bambuaj lancoj. Iu lanco enpikis ĝuste la centron de la pilko, de tio eksplodis ĝojkrioj ĉe la spektantoj.

La prezentado farita de Fuĝjan-teamo nomiĝas stango-pilkado (aŭ pilko-pikado). La aktivado estas populara en Pingdong de Tajĵan kaj Ĉaŭĝoŭ de Gŭangdong-provinco kaj estas tradicia sportobranĉo ŝatata de gaŭŝan-oj.

Pri ĝia origino estas bela legendo: Antaŭ tre longe, estis brava gaŭŝan-o gardanta fajrejon de la homaro. Iutage li subite trovis tigron sin ĵetanta al la fajro, li sagace pikmortigis ĝin per longa bambuo kaj tiel protektis la fajron. Poste, por rememorigi pri la bravulo oni kreis tiun interesan sporto-branĉon kaj daŭrigis ĝin generacion post generacio.

Stango-pilkado estas ludata ĝenerale inter vilaĝoj post ĉiu aŭtuno. Nur viroj povas partopreni la aktivadon sen limigo de ludantonombro, almenaŭ dekkelkaj kaj maksimume dekoj. Ĉe la komenco, en ĝojkrioj de vilaĝanoj eniras la konkursejon la sportistoj en nacia kostumo, kun glavo ĉe la talio kaj longa stango en mano. Poste la pilko-ĵetisto ĵetas en aeron la pilkon kun diametro de ĉ. 10 centimetroj. Tiam la sportistoj konkuras por piki la falantan pilkon per bambua stango longa je 7-8 metroj kun akra ferpinto sur la ekstremo. Kiu multfoje trafas la pilkon, estas la gajninto. La gajninto ricevas gratulon, respekton kaj ofte gajnas ankaŭ la koron de knabinoj.


ĜOJO DE MALJUNULO SURŜNURO-IRANTA

Tiu ludo estas gemo el la ujuguraj sportbranĉoj. Post longtempa disvolviĝo ĝi atingis senkompare altan nivelon. La sportisto ludas sur ŝnuro je 20-30 metroj super la tera surfaco surkapan staron, altosalton, ŝnursalton kaj aliajn danĝerajn movojn, eĉ iam kun okuloj vualitaj.

En la Dua Nacimalplimulta Sport-kunveno, Nuli Aŝjimuŝoŭ sola ludis surŝnuran iradon. Nun 67-jara, li jam ne povas plu ludi. Sed li kaj lia frato elkulturis kvin novicojn, kiuj povas fari la ludon. La 12-jara Ajiŝur estas la unua sportistino en la surŝnura irado. La maljunulo ĝojas, ke lia surŝnura irado havas novajn daŭrigantojn. Li diris: "Ni prezentis al la sport-kunveno saltadon, rapidan paŝadon, iradon kun pelvoj surkape kaj aliajn novajn programerojn por vidigi al diversnaciecaj spektantoj novan disvolviĝon de la surŝnura irado."



Nacia danco ĉe la inaŭguro




Kamela vetkurado Foto de ĈEN ZONGLJE




Mjaŭ-aj sportistoj ĉe la inaŭguro

La huj-a maljunulo Li Ĉingŝan kaj lia nepino



Lukto

Surŝnura irado






Rajdludo de kazaĥaj gejunuloj



Arbalestopafado de lisu-o Foto de PAN LI



Konkurso pri surĉevala kapto de kapro

Surĉevala pafado de tibetano



CIATEOJ TRAVIVINTAJ 400 MILIONOJN DA JAROJ

de SJU HONGLI



Gigantaj ciateoj (Cyathea spinulosa)

Ekologia medio, en kiu kreskas ciateoj



Pteridoj sur la trunko de ciateo



Ciateo (*Cyathea spinulosa*) estas rara antikva planto. Ĝi pompe kreskis sur nia tero en la periodo de silurio antaŭ 440 milionoj da jaroj ĝis karbonio antaŭ 350 milionoj da jaroj, sed post longtempa geologia ŝanĝo, precipe post forta atako de glaĉeroj, ĝi preskaŭ pereis. Nun ĝi videblas en malmultaj lokoj de la mondo. Ĝi, konata kiel "vivanta fosilio", estas tre grava por studi la evoluon de vegetaloj kaj la ŝanĝigon de la terkrusto.


Sciencistoj trovis pli ol 15 000 ciateojn en Ĝinŝagoŭ ĉe Ĉiŝuj-rivero en norda Gujĝoŭ-provinco, Ĉinio. Pro la apartaj lokaj geografiaj kondiĉoj kaj klimato kaj pro la malofteco de homaj aktivadoj la ciateoj kreskas dense, pompe kaj grandaree. La tipeco, perfekteco kaj reprezenteco de ilia societiĝo estas malofte videblaj en Ĉinio. Nun la ciateoj estas protektataj de la ŝtato kaj la loka registaro jam starigis rezervejon por ili.



Ŭang Sjanpu (meze), prezidanto de la Botanika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, observas ciateon.

En la rezervejo Ĝinŝagoŭ.

Botanikistoj en esplorado



VOJAĜO EN MALRIĈAJ LOKOJ DE NINGŜJA

Iumatene antaŭ 3 monatoj mi forlasis Jinĉŭan, la ĉefurbon de la Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono en la nordokcidenta Ĉinio, kaj veturis al gubernioj en la suda parto de la aŭtonoma regiono pro ofico. En la vespera krepusko mi atingis la gubernion Ŝjiĝji, kiu estis ofte sopirata de mi same kiel mia hejmloko, ĉar antaŭ 20 jaroj mi laboris 8 monatojn en ĝia vilaĝo Ŝjaŭŝahe.

La antaŭa fizionomio de Ŝjiĝji ne plu videblas. En mia memoro tie estis nur unu strato kaj preskaŭ ĉiuj domoj estis kabanaj el adoboj. Sed nun tie estas novaj domoj, belaj ĝardenoj kaj ondoblilaj basenoj. Kompreneble ĉio ĉi tute ne vekis ĉe mi intereson, mi devis daŭrigi mian vojaĝon al la vilaĝo Ŝjaŭŝahe en la sekva tago.

EN LA MALNOVA LOKO

La vilaĝo distancas de la gubernia urbo je 40 kilometroj, mia aŭto tamen iris 3 horojn. Ĉar ĉie sur la leŭsa altebenaĵo ondas montetoj kaj interkruciĝas valetoj, ne videblas ŝoseoj eĉ hodiaŭ en multaj vilaĝoj, tial la aŭtoj devas rampi sur riverbordoj plenaj de rulŝtonetoj. Estas monotona leŭsa montaro pli ol 1 000 metrojn alta super la marnivelo. Vidate de malproksime la sennombraj monteĝoj sin ligantaj formis senliman flavan tuton, similan al ondanta maro. Fine mi atingis la celokon.

Informiĝinte pri mia alveno, multaj vilaĝanoj eldomiĝis por min saluti. Estis ĝojo vere neesprimebla. Mia antaŭa dommastrino speciale preparis delikatajn vermiĉelojn por min regali.

Ankoraŭ staras la malnova arkoforma kavernodomo, kie mi loĝis antaŭ 20 jaroj. Ĝi tamen

fariĝis tenejo de greno kaj hejtaĵoj. Ankaŭ la kavernodomo loĝata de la mastroj antaŭ 20 jaroj nun aspektas pli kaduka. Endomiĝinte, mi tuj rimarkis, ke ĉio estas aranĝita same kiel antaŭ 20 jaroj: Sur la terlito estas kelke da malnovaj litkovriloj kaj kvadrata tableto kun kelkaj simplaj ĉiutagaj uzaĵoj sur ĝi. Krom tiuj vidiĝas nenio en la ĉambro. Kun peza koro mi diris: "Via vivo estas vere malfacila!" Sed ekster mia atendo la mastro ridete diris: "Ne, la vivo multe diferencas de la pasinta. Nun ni havas grenon sufiĉan por du jaroj. Ni plantis poplojn kaj ulmojn sur montodeklivo de 1.7 hektaroj laŭ kontrakto."

Mi scias, ke la loko estas ofte atakata de trosekeco kaj hajlo. Kvankam multaj familioj jam havas novajn brikdomojn kaj la produktado kaj vivo de la vilaĝanoj iagrade pliboniĝis, tamen la eventuala trosekeco ruinigos la grenplantojn kaj puŝos ilin en mizeron. Por radikale ŝanĝi tiun staton ili ankoraŭ devas multe labori.

ESPERO DE LA MONTREGIONO

Dum mia restado en Ŝjaŭŝahe kaj aliaj vilaĝoj de la gubernioj Ŝjiĝji, Gu'jŭan, Hajjŭan kaj Ĝingjŭan min ofte maltrankviligis la demando: La nova Ĉinio ja aĝas 37 jarojn. Kial tiuj lokoj progresas tiel malrapide? Respondeĉuloj de la aŭtonoma regiono kaj iuj gubernioj opinias, ke tio kaŭziĝis de geografia, historia, natura kaj socia cirkonstancoj, dum la ekologia malboniĝo estas la ĉefa kaŭzo.

En la gubernio Ŝjiĝji mi hazarde legis historian materialon, kiu diras: Antaŭ 900 jaroj en la Norda Song-dinastio Ŝjiĝji estis regiono abunda je arbaro kaj herboj. En Ming-dinastio (1368-1644



Strato de la gubernia urbo Ŝiĝĵi

p.K.) iu poeto admiris la lokon per la verso "Ĉevaloj grasiĝas per abundaj medikagoj". Ekde 1727 la registaro de Ĉing-dinastio difinis la lokon laŭplaĉe ekspluatebla, pro kio grandarea flaŭro estis grave detruita.

La senplanta leŭso dezertiĝis serioze kaj facile estas forlavita de pluvego. Kun tempopaso la vasta leŭsa altebenaĵo estis erozie dispecigita en profundajn sulkegojn. En iuj lokoj ĉiu kvadrata kilometro perdas 4 000 — 10 000 tunojn da tero ĉiujare, kio egalas al perdo de dekelkaj milimetroj da tersupraĵo kun sterkoj nitrogena, fosfora kaj kalia. De post 1949 tie la nombro de la loĝantoj rapide kreskis kaj ekmanis al kamparanoj greno, kaj pro la unuflankeca emfazo de grena produktado la arbaroj estis serioze detruitaj. Tia fenomeno daŭris ĝis 1981.

Koninte, ke vento, sablo kaj trosekeco estas seriozaj rezultoj de la ekologia detruigo, en la lastaj jaroj oni komencis racie utiligi la teron kaj planti arbojn, kaj kulturi herbojn sur montodeklivoj netaŭgaj por grenaj plantoj. La popolanoj de la suda parto de Ningŝja rigardas tion granda afero utila al la nuna generacio kaj la posteuloj.

Ankaŭ tio profunde impresis min dum mia vojaĝo.

Antaŭ 1982 en la vilaĝo Ŝanghŭang de Gu'jŭan-gubernio ĉ. 5 000 tunoj da tero por ĉiu kvadrata kilometro estis forportitaj de pluvo kaj al 70% de la loĝantoj mankis greno, tiam la pokapa jara enspezo estis nur 40-50 jŭanoj. En la lastaj 4 jaroj la lokanoj faris ĝeneralan reordigon al la mizeraj naturkondiĉoj. La 1985-jara pokapa posedata greno superis 500 kg., la oledonaj fruktoj superis 50 kg. kaj la pokapa enspezo atingis 355 jŭanojn. La vilaĝo sole en brutobredado enspezis 52 000 jŭanojn. Kvankam sur 30% de la kampoj estis denove kulturitaj arboj kaj herboj, la grena produktokvanto tamen pliiĝis je 55.4% kompare kun tiu plej alta en la historio. En la lastaj jaroj la vilaĝo elspezis 140 mil jŭanojn por produkta reformo, dum la totala enspezo estis 573 000 jŭanoj, 4-oble de la totala investo. En la hejmo de vilaĝano Hŭang Ĝangang mi vidis kudromaŝinon, radioaparaton, biciklon kaj iujn novtipajn meblojn, krome li posedas ankaŭ dispecigilon, muelmaŝinon kaj oleelpremilon.

Ŝiĝĵi-gubernio starigis oficejon de kampoŝirma forsto por direkti kamparanojn en kulturado

de arboj kaj herboj kaj provizas ilin per greno ekde 1982. Post 4-jara penado tiu gubernio, kie la flaŭro serioze damaĝiĝis, verdigis pli ol 100 mil hektarojn da tero. Tie la nove plantitaj poploj jam altas pli ol homo.


En Gu'jŭan cirkulas popoldiro: "Huj-oj aĉetas bovojn kaj ŝafojn se ili havas monon." Tamen antaŭ kelkaj jaroj la tieaj loĝantoj estis malriĉaj, kaj eĉ la diligentuloj povis fari nenion. Sude de la gubernia urbo de Gu'jŭan estas iu vilaĝo nomata Gŭomjaŭ. Tie 98.8% de la loĝantoj estas huj-oj. En la lastaj jaroj, samtempe kun kulturado de la arboj kaj herboj, oni energie disvolvis brutobredadon, la nombro de grandaj brutoj kreskis de 355 en 1978 al 608 en 1985 kaj tiu de ŝafoj al pli ol 1 800. La enspezo de brutobredado kreskis de 3 576 jŭanoj en 1978 al 64 085 jŭanoj en 1985. La prospera brutobredado akcelis la disvolviĝon de industrio, flankokupoj kaj plurspecaj entreprenoj. En 1985 la loĝantoj jam fundamente solvis la problemon pri manĝado kaj vestado.

Emfazante la grenan produktadon oni energie kulturis arbojn kaj herbojn kaj disvolvas plurspecajn entreprenojn, kio vigligas la ekonomion de la suda parto de la aŭtonoma regiono kaj donis al ĝi belan esperon.

KOMUNA RIĈIĜO

La 8-jara reformado de la ĉina kamparo multe ŝanĝis la kamparanan vivon. Tamen laŭ la supre menciita stato, ankoraŭ ekzistas diferenco inter riĉeco kaj malriĉeco. La politiko de la ĉina registaro permesas pli rapidan riĉiĝon de parto da loĝantoj kaj samtempe energie helpas la malriĉajn kamparanojn en disvolvo de la produktado por realigi la komunan riĉiĝon. Antaŭ mia vojaĝo mi informiĝis, ke ekde 1980 la ŝtato ĉiujare elspezas 500 milionojn da jŭanoj por helpi la okcidentan kaj nordokcidentan partojn de Ĉinio, inkluzive Ŝjiĝji-gubernion. Ankaŭ la Sepa Kvinjara Plano (1986 - 1990) de Ĉinio inkluzivas monhelpon al la


Safaro sur nova herbejo de Hajjŭan-gubernio



malriĉaj lokoj. En 1986 la ŝtato asignis 800 miliojn da jŭanoj por helpi la malriĉajn lokojn, plus la aliaj monhelpoj al agrikulturo, la totala sumo atingis 3 miliardojn da jŭanoj. Nun la ŝtato alprenis diversajn rimedojn por helpi tiujn lokojn. Ekzemple, la ŝtato senigis Ŝjiĝji-gubernion je grena imposto kaj ne aĉetas tie grenon en 5 jaroj kaj helpas la plagitajn kaj malriĉajn kamparanojn per mono, greno, koton, ŝtofo k.a. Tamen la ŝtato ŝanĝis la help-rimedon. Ĝi helpas kamparanojn en disvolvo de la produktado kaj hejmaj flankokupoj per pruntedono kun malalta rentumo aŭ donas al la malriĉaj kamparanoj laboron por pliigi ilian enspezon. Ekzemple, la ŝtato tie ĉi konstruas ŝoseon, akvoutiligan instalaĵon kaj faras verdigon, en tiuj aktivadoj partoprenas lokaj kamparanoj. Tio egalas al dono al ili je laborŝancoj portempe.

Koncerne la kamparanojn nehavantajn sufiĉe da kampoj kaj trafitajn de plurfoja plago, la ŝtato kuraĝigas kaj helpas ilin transloĝiĝi al la meza parto de Ningŝja irigaciata de la Flava Rivero por okupiĝi pri ekspluateca produktado. Mi informiĝis, ke en la regiono irigaciata de la Flava Rivero estas pli ol 130 mil hektaroj da virga tero taŭga por forstumo kaj terkulturo, tamen pro manko de laborfortoj ili dormis longtempe. Ekde 1983 pli ol 20 mil kamparanoj transloĝiĝis tien de Ŝjiĝji, Gu'jŭan, Hajjŭan kaj aliaj lokoj. Ili ekspluatis sume 3 800 hektarojn da virga tero kaj plantis milojn da arboj. La ŝtato asignis entute 11.65 milionojn da jŭanoj por konstrui ŝoseojn kaj akvoutiligajn instalaĵojn en la novaj loĝlokoj kaj pli ol milionon da jŭanoj por konstrui loĝdomojn, lernejojn, kuracajn staciojn, butikojn kaj grenvendejojn.


La huj-oj kaj hanoj en Ŝjiĝji kaj aliaj gubernioj zorgas ne sole pri vivpliboniĝo de la propraj familioj, sed ankaŭ pri forĵeto de malriĉeco de pli da kamparanoj kaj eĉ la tuta vilaĝo. Ĉe la piedo de Nanhŭa-monto vivas kamparano Tjan Ŝinfang. Trovinte, ke en la montaro la trafiko estas malfacila kaj multaj kamparanoj implikiĝas pro malfacila transportado de la terkulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, li do pruntis monsumon kaj aĉetis aŭton por transporti terkulturajn produktaĵojn de la kamparanoj. Li starigis 18 aĉetajn prilaborajn punktojn por vendi filikojn al la eksterkomercaj departementoj. Por tio Tjan dungis 150 kamparanojn, kio rapide liberigis ilin el la malriĉeco.



La akvoutiliga instalaĵo de Gujŭan kaj Hajjŭan farita per mono asignita de la ŝtato

ANONCO

Por kontentigi la bezonon de diversaj Esperantaj organizoj, bibliotekoj kaj gesamideanoj, oni pretigis jarkolektojn de EPC por 1984 kaj 1985. Ĉiu jarkolekto kostas 12 usonajn dolarojn, mendebla ĉe la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN). Adreso: P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.



Sjabuzi-vilaĝo

ŬANG ŜIJONG:

ANTAŬ 20 JAROJ KAJ HODIAŬ

La redakcio de "El Popola Ĉinio" donis al mi, ĝia raportisto, taskon viziti Ŝjiĝji-gubernion en la fora Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj verki ion por niaj legantoj. Mi tre ĝojis kaj tuj akceptis la taskon.

Ningŝja estas la plej malgranda administra unuo sur la ĉina ĉeftero ĉe ĝia provinca nivelo kaj unu el la plej malriĉaj regionoj de Ĉinio. Kaj Ŝjiĝji en ĝia sudokcidenta montregiono estas unu el ĝiaj plej malriĉaj gubernioj.

Unu tagon post kiam mi atingis Jinĉŭan, la ĉefurbon de Ningŝja, mi ekveturis per aŭtobuso al Ŝjiĝji.

Pro kio mi tiel ĝojis? Pro la amikeco inter mi kaj la lokaj kamparanoj. Antaŭ 21 jaroj mi diplomitiĝis el altlernejo kaj havis ŝancon labori por unu jaro en Ŝjiĝji, kie mi amikiĝis kun montvilaĝanoj.

En la pasintaj 20 jaroj la Fortuno neniam sendis min tien, sed mi ĉiam tenis la amikojn en mia memoro.

La buso elurbiĝis kaj larĝa avenuo prezentiĝis antaŭ miaj okuloj. Kuris la buso kaj mi dronis en rememoro. Antaŭ 20 jaroj mi sidis dum horoj en aŭto veturanta sur tiu sama longa grua vojo

kaj levanta polvon konstante. Post nelonge ni ĉiuj fariĝis flavaj "budhoj" polvoplenaj.

Subita buso-skuo rompita mian rememoron. Estis varmega somero. La suno brulis kiel fajro. Feliĉe, ke la altaj poploj ambaŭflanke de la vojo kiel granda ombrelo ŝirmis nian veturantan buson. Agrabla vento milde kisis nin tute sen polvo. De tempo al tempo nin preterkuris iuj aŭtoj kaj aliaj kuregis renkonte al ni. Estis multaj kamionoj kaj aŭtobusoj. Mi bone memoras, ke antaŭ 20 jaroj sur la senviva vojo iris mizera nombro da ŝarĝaŭtoj. Tiam nia aŭto veturis tutan tagon, renkontante eĉ neniun alian. Kiam ĝi proksimiĝis al la vilaĝo, kie mi devis vivi kaj labori, ĉiuj vilaĝanoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, rapidis al la vilaĝfino por rigardi tiun herkulon. Ili unuafoje vidis aŭtomobilon.

Vesperiĝis, kiam la buso atingis la gubernian urbon. Mi pasigis unu nokton en la bela, komforta gastejo de la gubernia registaro. La sekvantan matenon oni veturigis min per ĵipo al la montvilaĝo.

Mi pli kaj pli ekscitiĝis, kiam mi iom rekonis la iam iritan vojeton, proksiman al la vilaĝo. 20 jaroj pasis, ĉu miaj amikoj rekonos min? Ĉu la geonkloj ankoraŭ vivas? Mi memoras, ke antaŭ 20 jaroj, ĉe la adiaŭo al la vilaĝo, la geonkloj kaj gejunuloj akompanis min malproksimen. Iu onklo kun larmoj en la okuloj demandis min, tenante miajn manojn: "Kiam vi venos denove, Ŭang?" "Post kvin jaroj." Sed post 20 jaroj realiĝis mia deziro reviziti la montvilaĝon. Mi devis peti ilian pardonon.

Kun ekscitiĝo mi iris paŝon post paŝo.


"Ĉu vi estas oĉjo Ĝang?"

"Jes, kiu vi estas? Mi ne bone vidas."

"Mi estas Ŭang. Antaŭ 20 jaroj mi vivis ĉi tie."

"Ha, estas vi. Tuj iru al mia hejmo."

Apenaŭ mi endomiĝis, li rakontis al mi, ke lia familio konstruis novajn domojn kaj ili ne plu loĝas en la kavernodomo. Antaŭ 20 jaroj mi loĝis ĉe li unu monaton. Tiam la vilaĝo havis 18 familiojn kun 118 homoj, nur unu tegolitan domon. La sola luksaĵo estis termosoj apartenanta al la vilaĝa kontisto. Nun oĉjo Ĝang havas sufiĉon da tabloj kaj seĝoj, plurajn termosojn, inkluzive pump-termosojn raran eĉ por urbanoj. Sur



Vilaĝestro Meng Janĝang (dekstre) kaj la aŭtoro

tablo tiktakis horloĝo kaj apud ĝi sidis radioriĉevilo. Oĉjo Ĝang infuzis por mi teon kun sukero.

Aŭtuno en la montvilaĝo estas malvarma. Ofte prujnas kaj neĝas. Tiujare mi en vatitaj vestoj kaj gantoj draŝis kune kun kamparanoj, sed neniu el ili portis gantojn. Multaj junuloj nur maldikan pantalonon. Iuj knaboj nudpiede ludis sur neĝa kampo. Mi ne toleris tion, mi kompatis ilin, sed mi ne povis ŝanĝi ilian situacion, mi do ofte donacis al ili bombonojn. Kun la frandaĵo ili saltis ĝojkriante. Tio iom konsolis min, sed kaŭzis al mi pli da korprenemo. En ilia kavernodomo estis nur terlito kun mato kaj felto por ĉiuj sezonoj. Vatita litkovrilo vidiĝis nur en malmultaj hejmoj. La malgranda kavernodomo, kie mi loĝis, havis jutan sakon anstataŭ pardonon. Apud mi dormis Janfang, la unua infano de la dommastro. Li ne havis vatitan litkovrilon. Mi hezitis kelkajn tagojn kaj fine venkis mian egoisman penson. Mi proponis, ke li dormu kune kun mi sub mia litkovrilo. Kun ĝojo li akceptis mian proponon. Sed baldaŭ griziĝis mia blanka vatita litkovrilo. Nelonge poste ĉe la faldoj de miaj vestoj aperis multaj pedikoj, kiujn mi devis mortigi ĉiuvespere ĉe kerosena lampo. Tamen mi tre ĝojis, ke mi donis al la knabo iom da varmo.

Mi venis al la hejmo de Janfang. La malgrandan kavernodomon oni jam ne plu disponis. En la korto paradisa tegolita domo duĉambra. Sur la terlito kuŝis abundo da vatitaj litkovriloj. La vazoj grandaj kaj malgrandaj estis plenaj de

diversaj grenoj. Janfang prezentis al mi teon kun multe da sukero. Liaj du bunte vestitaj infanoj en la leŭsokolora korto aspektis kiel floroj.

“Evidente, vi vivas multe pli bone ol antaŭ 20 jaroj.”

“Kompreneble.”

“Kian brulaĵon vi uzas?”

“Karbon. Ĉiu kilogramo kostas 12 fenojn*.”


Antaŭe la vilaĝanoj eĉ ne konis karbon. Ili kolektis herbon, bovan kaj ŝafan fekaĵon por hejtado.

Mi vizitis multajn familiojn, kiuj ĉiuj konstruis novajn tegolajn domojn kaj bredis en sia korto kokojn kaj ŝafojn. Sed ŝafoj estis malmultaj. Kial? Vilaĝanoj diris, ke mankas fojno kaj cetere oni nun plantas arbojn kaj priplantas montojn per herboj. Pro tio oni blokas la montojn, ne lasante paŝti tie ŝafojn. En la pasinteco oni ne atentis pri perdo de akvo kaj grundo. La arbo-plantado kaj herbokreskigo estas tre gravaj por levi la agrikulturan produktokvanton.

La vilaĝo situas sur montodeklivo. Mi ĉirkaŭprenis la montojn per la okuloj kaj vidis ilin kovritaj de hela verdo. La arboj estas ankoraŭ junaj kaj herboj ne densaj, tamen estas bone, ke oni havas ion pli ol nenion.

De malproksime aŭdiĝis kantado kaj bruado de infanoj. Estis elementlernejanoj, kiuj hejmenrevenis. Brilkolore vestitaj, ili estis tre okulfrapaj

Janfang, lia edzino kaj iliaj infanoj



sur la flava kaj verdeta fono. Ili portis vestojn multe pli bonajn ol iliaj gepatroj en la juneco. Neniu el ili estis ĉifonvestita. Ili estas pli inteligentaj ol iliaj gepatroj kaj neniam estos analfabetoj kiel ili. La loka registaro alte taksas edukon. Preskaŭ el ĉiu vilaĝo devenas diplomitaj studentoj, kiuj laboras en Ŝjiĝji aŭ en aliaj gubernioj. Oni komencis respekti sciencojn kaj ankaŭ instruistojn. Tie nova juna instruisto enspezas preskaŭ kiom mi.

“Kiam oni liveros elektron?” mi demandis Janfang.

“Baldaŭ. Kredeble en ĉi jarfino.”

Vere, jam survoje mi vidis cementajn stangojn kuŝantaj po dekoj da metroj inter si.

“Kiom da infanoj vi havas?”

“Kvin.”

“Kio?”

“Jes, tiom.”

“Tro multe.”

“Ne tro. Iuj havas eĉ ok aŭ naŭ.”

En la 20 jaroj duoble kreskis la nombro de la familioj, duobliĝis ankaŭ tiu de la loĝantaro, sed kampoj ja ne multiĝis. Tio estas serioza problemo. Ĝuste pro tio la gubernia registaro baldaŭ okazigos kunvenon por naskolimigo en la gubernio, kion mi jam aŭdis, kiam mi estis en la gubernia urbo. Mi esperas, ke oni senprokraste solvos la problemon.

La ŝanĝiĝo de la vilaĝo trankviligis min. Kvankam ĝi ne estas granda, tamen mi kredas, ke la vilaĝo ricevos pli kaj pli novan fizionomion kun la rapida reformado de la kampara ekonomia sistemo.

Mi devis adiaŭi la montvilaĝon. La amikoj, kiel antaŭ 20 jaroj, akompanis min ekster la vilaĝon. Anstataŭ demandi min, kiam mi venos denove, ili diris, ke ili ŝparos monon por viziti min en Pekino post kelkaj jaroj. Mi esprimis, ke mi akceptos ilin, kiel ili gastigis min. Sed mi pensis, ke mi devas reviziti la vilaĝon post kelkaj jaroj, ĉar tiam okazos al ĝi certe nova ŝanĝiĝo kaj mi eble verkos ion interesan por niaj legantoj.

* Feno estas monunuo de Ĉinio. Unu jŭano egalas 100 fenojn.

Post la bankroto de entrepreno

Je la 9-a horo de la 3-a de aŭgusto ĉi-jare, en kunvensalono de Ŝenjang-hotelo s-ro Ŭang Gang, estro de la Ŝenjang-a Fabriko de Kontraŭeksploĉaj Aparatoj, deprimate transdonis la fabrikan legitimilon al la industria kaj komerca administracio. Tiam oficiale bankrotis la fabriko, kiu havis deficiton kaj vivis el pruntepreno en sinsekvaj jaroj.

Ĝi estas la unua entrepreno, kiu bankrotis post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. La ĉefaj ĉinaj radiostacioj, televidstacioj kaj ĵurnaloj informis pri tio kaj ĵurnalistoj venis unuj post aliaj al Ŝenjang por intervjuo. En mallonga daŭro la vorto "bankroto" skuis la gvidantojn de sennombraj entreprenoj de la lando.

La informo sensaciis ankaŭ eksterlande. La usona semajna gazeto *Time* publikigis artikolon kun jenaj vortoj: "Tio estas ofte videbla fenomeno en la Okcidento. Miloj kaj dekmiloj da laboristoj estas avertitaj, ke ĉiliaj kompanioj dronas en malfacila situacio kaj ili perdos sian laboron. Ĉi-foje tio okazis ne en Detrojto, Manĉestro aŭ Liono, sed en Ŝenjang en nordorienta Ĉinio... Estas vere frakasita la egalismo de Ĉinio en distribuado!"

KIA ENTEPRENO DEVAS BANKROTI?

La Ŝenjang-a Fabriko de Kontraŭeksploĉaj Aparatoj kun iom pli ol 70 laboristoj estis malgranda kaj apartenanta al loĝkvartalo. Ĝi havis fiksan kapitalon valorantan nur 50 000 jŭanojn (ĉ. 3.7 jŭanoj egalas al unu usona dolaro), sed ĝia totala ŝuldo jam atingis 503 000 jŭanojn. Laŭ difino pri bankroto de urba entrepreno de kolektiva posedanteco, la industria kaj komerca administracio de Ŝenjang je la 3-a de aŭgusto 1985 donis al la fabriko averton pri bankroto kaj ordonis al ĝi elturniĝi el la situacio de serioza deficiton en la daŭro de unu jaro. Sed post unu jaro la stato de la fabriko fariĝis ankoraŭ pli malbona kaj fine la fabriko bankrotis.

Koncerne la aferon, estro de la Ŝtata Ekonomia Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko montris al ĵurnalistoj, ke la fakto per si mem rompita la diron, ke la socialismaj entreprenoj neniam bankrotos. Tio vidigas, ke kun paŝo postpaŝa profundiĝo de reformado de la ekonomia strukturo sekvas konsekvenca tendenco, ke la entreprenoj devas mem respondi pri siaj profitoj aŭ per-

doj kaj tiuj kun serioza deficiton devas bankroti.

En la pasinteco laŭ la posedanteco ĉiuj entreprenoj apartenis al la ŝtato kaj la ŝtato respondecis pri iliaj profitoj aŭ perdoj. Oni al kutimiĝis al egalismo en distribuado kaj opiniis, ke tio estas supereco propra al socialismo. En 1966, kiam la fabriko ekfunkciis, la individua enspezo strikte ligiĝis kun la produktado de la entrepreno. Ĉiu entuziasmis por sia laboro. En la unuaj jaroj post sia naskiĝo la fabriko ne havis deficiton, sed iom da profito. Post kiam ĝi fariĝis entrepreno de grandkolektiva posedanteco depende de urbo, ĉiu ĝia laboristo ricevis, krom regula salajro, ankaŭ subvencion por bonstatigo kaj labora asekuro. La produktado ne disvolviĝis, dum la diversaj elspezoj draste pliiĝis. En la fabriko proksimume 30 funkcioj ne partoprenis en produktado. La fabriko suferis de granda ŝuldo, dum la kadroj ekskursis per publika mono, ĉiu-jare 10 000 jŭanoj.

Ne mankas tiaj ekzemploj en Ĉinio. En la fino de 1984 Ĉinio havis 437 200 entreprenojn, inter kiuj estis 84 100 entreprenoj de tutpopola posedanteco. Multaj entreprenoj havis malgrandan ekonomian efikon. Rimarkinda



Laboristinoj de la Senjang-a Tria Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj

parto de ili havis deficiton. La tuta negativa saldo inter profito kaj defcito de iuj entreprenoj dum jaroj superis la totalan valoron de ilia fiksa kapitalo. Ili vivis nur de ŝtata subvencio kaj monprunto de banko. Tio multe malgrandigis la socian ekonomian efikon. Unuflanke la ŝtato devis doni pli kaj pli da financa subvencio, kaj aliflanke iuj entreprenoj povis ĝui la profiton de aliaj, kvankam ili havis deficiton. Kaj tiel estiĝis la situacio, ke ĉiuj entreprenoj vivas de egalismo kaj neniam bankrotas.

Atribui bankroton al la entreprenoj ne povantaj plu vivi

signifas administri kaj kontroli ilin per ekonomia kaj leĝa rimedoj por fari ilin produktantoj kaj maŝumantoj de socialismaj varoj, kiuj faras memstaran administradon kaj respondecas pri profitoj aŭ perdoj. La rimedoj povas defendi la ŝtatan havaĵon kaj leĝajn rajtojn de kreditoro kaj debitoro, kaj akceli la konkurencon de entreprenoj, kio havas gravan signifon por altigi la kvaliton de produktoj, ekonomian kaj socian efikon.

POST LA BANKROTO

La bankroto de la fabriko estiĝis la problemon, kiel trakti ĝiajn

72 laboristojn kaj oficistojn kaj ĝiajn 200 kreditorojn.

Ses maljunaj laboristoj de la fabriko pretis sin mortigi en la tago de la bankroto. Poste tio ne okazis. Ili trankviliĝis, informiĝinte pri la politiko por la bankrotintaj entreprenoj. Laŭ la difino de la Senjang-a magistrato, oni devas plenumi procedon por laborŝanĝo de laboristoj kaj oficistoj, kiujn volas akcepti alia entrepreno; civila departemento devas havigi profesion al kriplaj laboristoj kaj oficistoj; oni devas plenumi procedon por ĝuigi emeritecon al laboristoj kaj oficistoj, kiuj atingas la aĝon taŭgan por emeritiĝo; kaj la aliaj laboristoj kaj oficistoj devas atendi laborŝancon. En la ses monatoj post la bankroto oni salajras la laboristojn kaj oficistojn je 75% kiom antaŭe, kaj ekde la sepa monato la laboristoj kaj oficistoj ricevas po 30 jŭanojn. Post du jaroj la civila departemento donas al ili monhelpon laŭ normo de socia helpo.

Finiĝis la lasta ĝenerala kunveno de la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko kaj oni arope diskutis pri tio.

“Estas vere ekster mia atendo, ke post la bankroto de la fabriko ni povas egalrajte ĝui la emeritecon,” kontentis emeritoj kaj ankaŭ kripluloj.

“Malaltigita salajro garantias nur minimuman vivnivelon.”

“Nun mia plej granda deziro estas ricevi okupon kiel eble plej baldaŭ.”

Vere tiel pensis la senlaboraj laboristoj kaj oficistoj. Trakcisto Ŝju Ĉengŝeng antaŭe estis stabllaboristo. Li volis partopreni ekzamenon por labori en alia fabriko per siaj lertaj manoj. La 28-jara veldisto Haŭ Ŭanĉun ekfunkciigis malgrandan res-

toracion. Sed la enspezo ne estis kontentiga, li do sin preparis por starigi viandvendejon. Iuj intencis bredi fiŝojn en kamparo kaj aliaj ne sciis kion fari.

La kreditoroj pensis, ke ili implikiĝos en monprunto. Sed la aktuala situacio estis pli favora ol atendite.

Antaŭ ses jaroj kamparano Gaŭ Ĝenmin pruntis pli ol 1 000 jŭanojn por prilabori siliciajn ŝtallamenojn por la fabriko, sed la fabriko prokrastis doni al li 2 730 jŭanojn. Li diris: "La fabriko ne donis al mi la monon, kaj mi ne povis kvitiĝi kaj grave malsaniĝis de tio. Nun mi povas kovri mian ŝuldon."

Estas neeble por la fabrikoj, kia la Ŝenjang-a Fabriko de Kontraŭeksplozaj Aparatoj, kovri la tutan ŝuldon per si mem. Reprezentantoj de la kreditoroj, la Ŝinhŭa-a Plastaĵa Fabriko de Ĉangĝoŭ, Ĝjangsu-provinco, kaj la Harbina Fabriko de Vaporaj Turbinoj, opiniis, ke kvankam la difino kaŭzas al la kreditoro certan perdon, tamen ĝi iasence defendas liajn interesojn, kompare kun tio, ke la fabriko ne redonis la monon, nek elspezis tempon kaj monon por urĝi la redonon."

Kiel pagi ŝuldon al banko, kiel defendi la leĝajn rajtojn de la banko, laborista sindikato, laboratendantojn post la bankroto de entrepreno, ĉio ĉi estas zorgata de banko, laborista sindikato, laboragentejo kaj asekura kompanio.

Kiel kreditoro, banko siavice devas dividi la perdon kaŭzitan de la bankroto. Pro tio oni devas praktiki entreprenan administradon, en kiu entrepreno respondecas pri siaj profitoj kaj perdoj. Tial oni devas starigi fonduson por monprunta risko kaj reformi la nunan regularon pri monprunta asekuro.

Laborista sindikato kiel organizo defendanta la leĝajn rajtojn de laboristoj devas aktive kunlabori kun koncernaj departementoj por havigi okupon al laboristoj kaj oficistoj de bankrotinta entrepreno.

Des pli grava estas reformado de la laborsistemo. Ĝi devas malfermi vojon de labordono, ludi pli grandan rolon en reguligo de laborfortoj kaj rapidigi la racian cirkuladon de laborfortoj.

Konforme al tio, la asekura kompanio entreprenas novan servon: kolekti, mastrumi kaj disponi la socian help-fonduson por

bankrotinta entrepreno. Tio estas grava en kompleto da reformoj.

EDIFO DE BANKROTO

La 3-an de aŭgusto 1985 ankaŭ aliaj du fabrikoj, la Ŝenjang-a Fabriko de Metalaĵoj kaj la Ŝenjang-a Tria Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj, ricevis averton pri bankroto. Post unu jaro ili rimarkinde plibonigis sian administradon kaj certgrade revigliĝis. La magistrato decidis longigi la periodon por ordigi kaj savi fabrikon je unu jaro.

En laborejo de la Ŝenjang-a Fabriko de Metalaĵoj




Ricevinte la averton, oni tuj sentis maltrankvilon, ke oni senlaboriĝos kaj vivos de monhelpo post la bankroto de sia fabriko. Iuj laboristoj de la Ŝenjanga Tria Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj, kiuj faris negocon sur strato, revenis unuj post aliaj al sia fabriko. Pluraj laboristoj, kiuj petis aliĝi al alia entrepreno, ĉesigis sian peton. Ĉiuj laboristoj zorgis pri la sorto de sia

fabriko. Ili memvole kolektis monon por la fabriko. Neniu postulis kromsalajron post pluslaboro por novaj produktoj. Kiam la Ŝenjanga Fabriko de Metalaĵoj bezonis akvovojon, ĝiaj laboristoj mem faris tian vojon nokte, kaj tiel la fabriko ŝparis 600 jŭanojn. Ili laboris eĉ en neĝaj tagoj, tamen neniu el ili plendis, nek postulis kromsalajron. La averto vere havigis al la laboristoj la de-

vokonscion de mastro de la entrepreno.

La bankrotinta entrepreno skuis la aliajn entreprenojn. Ĉiuj entreprenoj, ĉu prosperaj, ĉu meze prosperaj, ĉu bankrotantaj, serioze zorgas pri sia estonteco. Lastatempe ĉinaj ĵurnaloj plurfoje informis, ke iuj fabrikoj ricevis averton pri bankroto. Se ili ne bonigas sian administradon, ilin atendas bankroto.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Urumĉi
2. Jinĉŭan
3. Ŝjiĝji-gubernio
4. Sanming

5. Longjan
6. Ĝangĝoŭ
7. Ĉjŭanĝoŭ
8. Ŝjamen

9. Utaj-monto
10. Emej-monto
11. Ĝiŭhŭa-monto
12. Putŭo-monto

ESP-MOVADO EN LA NUNA ĈINIO

Tuj antaŭ la 71-a UK, por koni la progreson de la ĉina Esp-movado en la lastaj jaroj, la redakcio de El Popola Ĉinio faris enketon pri la lokaj Esp-organizoj de Ĉinio. La enketo montris, ke ekde 1979 la ĉina Esp-movado vigle disvolviĝis kaj malfermis novan paĝon en sia historio.

Nun ekzistas la landaj Esperantaj organizoj la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la societo Amikoj de Esperanto. Escepte de Tibeto kaj


Gujĝou-provinco, la ceteraj 27 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj jam havas sian provincnivelan Esperantan asocion (aŭ ligan). La plejparto de la provincaj ĉefurboj kaj gravaj urboj de Ĉinio havas siajn Esperantajn societojn. Ĝis la fino de aŭgusto estis sume 80 tiaj organizoj. Krome, fondiĝis ankaŭ 25 guberniaj Esperantaj societoj.


En Ĉinio multaj junuloj lernas Esperanton. Aperis en 9 urboj

societoj de junaj esperantistoj. Veterana esperantista asocio fondiĝis antaŭ nelonge en Pekino. Krome estas 13 fakaj Esperantaj organizoj, kiaj medicina, fervoja, trafika k.a. Ĉio tio montras, ke la ĉina Esp-movado nun profundigas en la socio.

De 1979, 57 institutoj kaj universitatoj funkciigas Esperanto-kurson. Inter ili estas enlande famaj altlernejoj, kiel la Orient-Ĉinia Instruista Universitato,

Esperanto-kurso en Ĝjnan-universitato





La Ĉangĝou-a Esperanto-Asocio okazigas sian jarkunvenon de 1986.

Centra-Ĉinia Instruista Universitato, Pekina Fremdlingva Instituto, Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Ĝjnan-universitato, Ŝjamen-a Universitato, Fudan-universita-

to, Siĉŭan-a Universitato, Uhan-a Universitato, Ĉina Scienc-teknika Universitato k.a. Laŭ statistiko, 5 000 studentoj lernis kaj lernas nian lingvon.

En la tuta lando funkcias 33 Esperantaj korespondaj lernejoj aŭ kursoj kun 400 000 homfojoj.

En Ĉinio estas pli ol 20 Esperantaj aŭ ĉina-Esperantaj gazetoj (tipografie presitaj), el kiuj estas "La Mondo", "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj", "Amikoj de Esperanto", "Voĉo de Esperanto", "Lernado de Esperanto", "Esperantisto", "La Espero" k.a. Lokaj Esperantaj organizoj eldonas pli ol 200 organojn kun riĉa enhavo (mimeografe).

Estas unu provinca kaj ses urbaj radiostacioj kiuj funkciigas Esperanto-kurson. Ankaŭ la Ĉinghaj-a Televidstacio havas sian E-kurson.

En la lastaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis ĉ. 70 titolojn de libroj kun eldonkvanto de 700 000 ekzempleroj. Lokaj eldonejoj, Esperantaj asocioj kaj Esperantaj korespondaj lernejoj eldonis ĉ. 120 titolojn de libroj kun eldonkvanto de 3 000 000 ekzempleroj. Ĉio tio estas senprecedenca en la historio de la ĉina Esp-movado.


Solve por "Rimarkigu":

1. La romaj ciferoj "IX" kaj "XI" estas inversigitaj;
2. Kiam la minutmontrilo montras la 11-an minuton, la hormontrilo ne devas montri ĝuste la 10-an horon;
3. Estas erare muntitaj la minutmontrilo kaj hormontrilo. La hormontrilo devas esti muntita sub la minutmontrilo;
4. La gradoj inter du ciferoj estas eraraj; kaj
5. La du langetoj por streĉi la risorton devas esti ĝenerale kvarangulaj, ĉar alie tute ne eblas streĉado.

Solve por Testo de Inteligenteco:

Solvej por Enigmoj:

1. Tigro
2. Ajlo



BONA KOMENCO DE LA KOMBINO DE ESPERANTO KUN SCIENCOJ KAJ TEKNIKO



*Sun Honglje (dekstre)
salutas la konferencon.*

Estis neimageble antaŭ kelkaj jaroj, ke landa akademio de sciencoj havos Esperanto-societon kaj plie ĝi okazigos internacian simpozion en Esperanto. Tamen, nun la deziro jam realiĝis en Ĉinio.

La Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto en 1986 okazis en Pekino de la 22-a ĝis la 24-a de julio sub la aŭspicioj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ĝin prezidis Sun Honglje, vicprezidanto de la akademio, kaj alia vicprezidanto Jan Dongŝeng donis inaŭguran paroladon.

Ĉeestis la konferencon ĉ. 300 sciencistoj kaj scienc-teknikaj laborantoj el Japanio, Usono, Britio, Francio, FR Germanio, Jugoslavio, Hungario, Bulgario, Nederlando, Finnlando, Brazilo, Kolombio, Nepalo, Sri-Lanko, Togo, Tanzanio, Kongolando kaj

Ĉinio. Ili unuanime opiniis, ke la konferenco estas bona komenco de la kombino de Esperanto kun scienco kaj tekniko.


La konferenco ricevis 102 disertaĵojn. Ĝia ĉefa temo estis "La hodiaŭaj kaj morgaŭaj scienco kaj tekniko". En la konferenco sciencistoj el diversaj landoj senĝene interŝanĝis siajn opiniojn pri nova stato kaj disvolviĝo de la nuntempaj sciencaj inventoj.

Post tio, ĉeestantoj prelegis siajn disertaĵojn pri baza scienco, teknika scienco, medicino kaj biologia kemio, scienc-teknika politiko kaj administrado, lingvistiko, terminologio kaj instruado de Esperanto.

Otto Haszpra, profesoro de la Budapeŝta Teknika Universitato de Hungario, prelegis sub la titolo "Hidromekanikaj Problemoj Koneksaj kun Medioprotektado";

Benjamin Keh, usona entomologo, faris raporton kun la titolo "La Preparlabora Raporto pri Citratita Kafeino kiel Kandidata Insekticido"; Tosihide KUWAHARA, japana kemiisto, parolis pri "Industrio de Titaniaj Oksido kaj Metaloj"; la gesinjoroj Ralph Lewin, brita kaj usona oceanbiologoj, pri sia kulturado de maraj algoj kaj eksperimenta rezulto pri kompoŝtado; Sin'itirô KAWAMURA, japana biokemiisto, legis sian disertaĵon "Biokemio de Energifontaj Nutraĵoj".

En la grupo pri terminologio kaj instruado de Esperanto, profesoro Sidney S. Culbert, fama usona erudiciulo, faris raporton pri "La Estonteco de la Multeparolataj Lingvoj". Li parolis en la raporto pri la nuna stato kaj disvolviĝo de diversaj grandnaciaj lingvoj en la mondo. Pli interese estis, ke Kiril Draĵov, fama



Huang Hua (la kvara de dekstre en la fronta vico) kaj partoprenantoj de la konferenco

bulgara filologo, detale traktis tion per abundaj diapozitivaj filmoj, kiel formiĝis skriba lingvo de antikve. Kurisu Kei, japana lingvisto, parolis pri la "Defendo de la 'Fundamento de Esperanto'".

Ankaŭ ĉinaj sciencistoj kaj scienc-teknikaj laborantoj legis siajn disertaĵojn en la konferenco. Io Chou, ĉina entomologo, faris prelegon sub la titolo "Floros Esperanto en Ĝardeno de Entomologio". Sun Keding, matematikisto, prezentis al la ĉeestantoj sian fonetikan prononcon de ciferoj por memori historiajn jarojn; Li Sen, fervoja ĉefingeni-ero, legis la disertaĵojn kun la titolo "La nuna Stato kaj Perspektivo de Ĉina Fervojo"; Ding Ĝji, inĝeniero de media protekto, traktis "Pri la Nova Etapo de la Urba Mediprotekto en Ĉinio". Juna ĉina scienc-teknika laboranto Ĉjaŭ Ji traktis diversajn flankojn de permaŝina prilaborado de lingvo kaj kombinadon de Esperanto kun komputilo; Li Ŭej koniĝis sian aŭtomat-tradukan sistemon el Esperanto en la ĉinan kaj anglan lingvojn kaj elmontris rezulton de maŝina elmeto.

La disertaĵoj de ĉinaj kaj eksterlandaj sciencistoj kaj scienc-teknikaj laborantoj vekis grandan intereson ĉe la ĉeestantoj.

La konferenco glate iris en varma atmosfero, ĉar ĝi uzis Esperanton kiel sian laborlingvon. La ĉeestantoj ne nur interŝanĝis scienc-esplorajn fruktojn, sed ankaŭ konatiĝis kun multaj novaj amikoj kaj akcelis reciprokajn kompreniĝon kaj amikecon inter si. Ĉiuj esperis, ke ofte okazos tia konferenco por akceli la kombinon de Esperanto kun sciencoj kaj tekniko. Por tio, ĉinaj kaj alilandaj sciencistoj kaj scienc-teknikaj laborantoj unuanime aprobis proponon, kun jenaj punktoj:

1. Alvoki sciencistojn kaj teknikistojn de diversaj landoj, ke ili kiel eble plej multe publikigu siajn scienc-esplorajn disertaĵojn kaj teknikajn raportojn en Esperanto.

2. Ni esperas, ke diversaj sintezaj, multifakaj aŭ solfakaj internaciaj scienc-teknikaj konferencoj povos alpreni Esperanton kiel labor-lingvon, redukti tradu-


kan tempon kaj ŝpari multnombrajn homfortojn, materiajn kaj financajn fontojn, por ke la konferencoj akiru plej grandan efikon.

3. Komenci kolektadon de mon-donaco, kolekti eldonan fonduson kun sufiĉa monsumo kaj mobilizi esperantistojn el diversaj fakoj, ke ili kiel eble plej multe traduku diversfakajn verkojn en Esperanton kaj eldonu ilin, por ke la scienc-teknikaj legaĵoj eldonitaj en Esperanto povu rapide kaj grandnombre disvastiĝi.

4. Ni proponas starigi internacian Esperantan Instruejon, en kiu oni lekcias en Esperanto, por trejni junajn sciencistojn, kiuj povoscias Esperanton.

5. Estonte, en ĉiu dua jaro, ni okazigos Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto kun multaj fakoj. La venonta konferenco okazos en aŭgusto de 1988, en Pekino.

La sukceso de la konferenco estis nedisigebla de la alta takso far gvidantoj de la ĉina registaro kaj eminentuloj de diversaj



En la konferenco

rondoj de la socio. Ili esprimis en diversaj manieroj siajn prizorgon kaj subtenon al la konferenco. Al la konferenco faris salutvortojn Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, kaj Ĝang Joŭju, vicprezidanto de la Jura Komisiono sub la Konstanta Komitato de ĈPR. Lu Ĝjaŝji, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, sendis telegramon al la konferenco. Jan Ĝjici, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR, kaj Ju Gŭangjŭan, konsilisto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, faris salutvortojn kaj sendis gratulleterojn al la konferenco. Iuj famaj pentristoj kaj kaligrafoj speciale faris pentraĵon kaj skribis gratulvortojn por la konferenco. La inaŭguron ĉeestis ĉ. 500 personoj, inter kiuj troviĝis famaj sciencistoj Bej Ŝiĝang, Ma Ŝiĝjun, Ĝjang Liĝin, Tan Gaŭŝeng, Hŭang Bingŭej, Liŭ Dongŝeng, Ĝoŭ Mingĝen, Ĝu Gangkun, Ju Hongĵu, Jan Ŝjunĉu k.a.


Ankaŭ multaj famaj ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj donis al la konferenco fortan subtenon. En

la konferenco faris salutvortojn aŭ prelegon Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, Ĉen Jŭan, vicprezidanto de ĈEL, Helmar Frank, prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino kaj estro de la Kibernetika Instituto de FR Germanio, Yukiko Isobe, ĉefdirektorino de la Japana Esperanto-Instituto, Otto Haszpra, estro de la Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj Sin'itirô KAWAUMRA.

Ĉinaj kaj alilandaj sciencistoj alte taksis la kunlaboron en la konferenco. D-ro Helmar Frank diris: "Ni ĉiuj ĝojas, ke jam venis la tempo, kiam la Internacia Lingvo estas regule uzata ankaŭ ekster la Esperanto-Movado, por celoj de internacia scienca kaj teknika kunlaborado." Christian Darbellay, ĝenerala sekretario de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, diris: "Internacie la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), San Marino, la nove fondita Internacia Scienca Akademio Comenius kaj la Ĉina Akademio de Sciencoj laboras por la sama celo: apliki Esperanton en la scienc-teknika kampo. Tio havos gravan signifon en la evoluo de Esperanto." Jan Dong-

ŝeng diris: "Esperanto havas vivipovon nur tiam, kiam ĝi kombiniĝas kun praktika uzado. La hodiaŭa konferenco estas bona enkorpiĝo de akademia interŝanĝo per Esperanto en la scienc-teknika kampo!"

Usona esperantistino Sara Su Jones voĉlegas disertaĵon en la konferenco.



AGRABLA RENKONTIĜO

Radio Pekino disaŭdigis sian voĉon en Esperanto jam 22 jarojn. Ĝiaj aŭskultantoj troviĝas en pli ol 50 landoj kaj regionoj. La 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino estis ne nur grandioza kunveno de tutmondaj esperantistoj, sed ankaŭ senprecedenca renkontiĝo de aŭskultantoj de Radio Pekino.

La 29-an de julio aŭtobusoj de Radio Pekino veturigis pli ol 200 aŭskultantojn-amikojn el pli ol 30 landoj de la kongresejo al la domo de Radio Pekino. Komenciĝis la agrabla renkontiĝo.

En la salono pendis ruĝa rubando kun vortoj "Amikoj de Radio Pekino". Regis varma atmosfero. Amikoj, ligitaj antaŭe per radioondoj kaj leteroj, nun interkonatiĝis persone laŭ la konata voĉo. Sincera saluto, forta manpremo kaj brakumo superis ĉiajn vortojn.

Inter la ĉeestantoj estis malnovaj amikoj, kiuj persiste aŭskultas la programon de Radio Pekino ekde ĝia unua elsendo, novaj aŭskultantoj, kiuj kaptis la programon antaŭ nelonge, tamen fervore ĝin diskonigas inter esperantistoj, juna generacio, kiu

sub la patra influo entuziasme aŭskultas la elsendon kaj amike kontaktiĝas kun nia redakcio, kaj pluraj geedzaj paroj kaj eĉ esperantistaj familioj, kiuj konstante aŭskultas la elsendon kaj tenas ĉiam bonan kontakton kun Radio Pekino.

Liŭ Ŝjiljang, aganta direktoro de Radio Pekino, esprimis varman bonvenon al la gastoj. Li diris: "Vi, niaj amikoj, venis al Pekino kun deziro pri interkompreniĝo, paco, evoluo. Ankaŭ la celo de Radio Pekino estas interkompreniĝo, amikeco kaj komuna disvolvo. Ni esperas, ke vi prezentos opiniojn kaj proponojn

Vicministro de la Ministerio de Radio, Filmo kaj Televido de Ĉinio s-ro Ma Ĉingŝjong (la unua de maldekstre) kaj s-ro Grégoire Maertens (la dua de maldekstre) en bankedo



por plibonigi la Esperantan programon de Radio Pekino."

D-ino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, diris en la kunsido: "De la lastaj 15 jaroj mi regule aŭskultas la elsendon de Radio Pekino. La elsendo certigis al mi, ke mi povis konatiĝi kun la kulturo de Ĉinio. Mi povis sekvi la evoluon de kulturo kaj socio. Kaj mi povis amiĝi kun la reprezentantoj de Radio Pekino kaj kun ĉiuj esperantistoj ĉinaj. Ni esperas, ke estonte la gvidantaro de Radio Pekino daŭre subtenos la Esperantajn elsendojn, kiuj grave kontribuas al la disvastigo de informoj pri Ĉinio, popularigo de ĉina kulturo kaj ankaŭ grave kontribuas al la evoluigo de la faka lingvo ĵurnalisma."

Fama jugoslava verkisto s-ro Tibor Sekelj montris en sia parolado: "Ĉinio nun tage kvarfoje elsendas programojn en Esperanto al la tuta mondo. Tiu fakto estas pionira entrepreno, kiun Ĉinio komencis antaŭ pli ol 20 jaroj. Estas vere kuraĝa entrepreno, kiu donas ekzemplon al aliaj landoj. Mi esperas, ke ĝi plue evoluos kaj ke baldaŭ ni povos spekti televidan kurson en Esperanto kaj televidajn programojn ankaŭ, kiuj etendiĝas tra la mondo komenciĝante eble el Pekino kaj aliaj landoj samtempe, ĉar tio estas la estonteco de nia movado, la estonteco de la homaro!"

Fervora aktivisto en la Esperanta radio-kampo s-ro Günther Becker el FR Germanio esprimis: "Mi esperas, ke en la estonta tempo ni povos havi ankaŭ televidajn Esperanto-programojn el Pekino, kiujn mi aŭskultos kun sama entuziasmo, kian mi havis dum 20 jaroj por aŭskulti la radio-programojn de Radio Pekino."



*Kunsido de aŭskultantoj de Radio Pekino.
Meze staras s-ro Liŭ Ŝiljang.*

S-ro Maurice Sujet el Francio kun emocio rememoris: "Mi estas emerita direktoro de duagrada lernejo. Kun grupo de emeritaj geinstruistoj mi havis la plezuron vojaĝi al Ĉinio novembre de 1982. Ni havis la grandan honoron kun gesamideanoj de Radio Pekino viziti la Grandan Muron kaj la Tombojn de Ming-dinastio. Kaj tiam oni intervjuis min. Vespere de la 27-a de novembro 1982 mi havis la plezuron en mia vilaĝo aŭdi mian voĉon, kiu venis de Pekino. Tio vere estis emociiga por mi. Mi devas danki denove gesamideanojn en Radio Pekino!"

S-ino Ursula Grattapaglia, iama estrarano de UEA nun laboranta en Bona Espero de Brazilo, humure demandis la ĉeestantojn: "Mi deziras scii, kiu el vi estas la aŭskultanto de Radio Pekino el la plej fora lando. Mi supozas, ke estas mi. Ĉar mi loĝas ĉe la antipodo de ĉi tiu lando, je dudek mil kilometroj fore, en Brazilo. Tre feliĉe mi povas klare aŭskulti Radion Pekino."

S-ino Yukiko Isobe, ĉefdirektorino de la Japana Esperanto-Instituto, kun ĝojo diris: "En Japanio multego da esperantistoj entuziasme aŭskultas Radion Pekino, tamen mi volas rakonti al vi alian tre kortuŝan okazintaĵon. Tio estis antaŭ kvin jaroj, ĝuste antaŭ la Universala Kongreso en Brazilo. Mi personacele vizitis tiun urbon kaj restis ĉe unu el la komitatanoj de la Loka Kongresa Komitato. Kaj tie mi hazarde aŭskultis la elsendon de Radio Pekino. Mi estis ege kortuŝita. Tio estas la urbo, kie Ursula Grattapaglia loĝas. Tio estas tute alia parto de la mondo, tamen tien Radio Pekino ĉiam flugas kun espero tra la tuta mondo. Mi elkore deziras al ĉiuj aŭskultantoj bonan sanon, feliĉon kaj mi elkore deziras, ke Radio Pekino prosperu pli!"

F-ino Shirin Ahmad-Nia el Irano alportis al Radio Pekino la salutojn de iranaj samideanoj. Ŝi diris: "Ni povas iom malfacile ricevi la ondojn de Radio Pekino. Ni povas iom ricevi, kaj ni estas tre ĝojaj. Ni estas ege honoraj, ke ni povas partopreni

en ĉi kunveno.” Kun emocio ŝi deklamis sian poemon “Paco”.

S-ro Petâr Todorov nome de bulgaraj esperantistoj donacis al Radio Pekino novajn diskojn kun Esperantaj kantoj. Li diris: “La bulgaroj ŝatas muzikon, do ni deziras donaci al la redakcio la diskojn, ke ĝi utiligu ilin en siaj elsendoj. Pri la elsendoj ni opinias, ke la redakcio de Radio Pekino devas zorgi pri la interesaj elsendoj pri sia kulturo, pri la muziko, pri disvolviĝo de la ĉina vivo kaj la scienco.”

La gajan renkontiĝon ĉeestis ankaŭ redaktoroj kaj raportistoj de alilandaj frataj radioj, kiuj dum jaroj tenas bonajn amikajn rilatojn kun Radio Pekino. Ili venis el Radio Polonia de Pollando, Radio Zagrebo de Jugoslavio, Radio Peĉs de Hungario, Svisa Radio Internacia kaj aliaj. Ili estas kaj kolegoj kaj aŭskultantoj de Radio Pekino. Ili alportis ne nur varmajn kuraĝigojn, sed ankaŭ sinceran deziron por pli bona kunlaboro en la estonteco.

S-ro Andrzej Pettyn el pola radio diris: “Mi esprimas mian elkoran gratulon kaj ĝojon, ke la elsendo de Radio Pekino bone

enkondukis la kongresanojn en la ĉinan vivon, proksimigis Ĉinion antaŭ ilia alveno ĉi tien kaj tiamaniere plenumis gravan informan rolon. Ni, kiuj venis kaj kiuj aŭskultis, povas pli bone nun kompreni la vivon ĉi tie kaj pli bone orientiĝi pri tio, kion ni ricevis el la ĉina kulturo. Mi kredas, ke post la paso de la kongreso vi ricevos pli multe da aŭskultantoj. Unu el la ĉefaj kaj belaj praktikaj celoj de la elsendoj estas informado. Kaj en tio Esperanto plenumas bonege sian rolon.”

Amiko el Svislando improvizis poemeton honore al Radio Pekino:

*Pacon por la homar'
fervora esperantistar'
deziras sur la kurtond'
el Pekino al la tutmond'!*

La renkontiĝo iris en frata familiareco. Sinceraj gratuloj, elkoraj bondeziroj kaj kuraĝigoj de la amikoj pli proksimigis kaj intimigis Radion Pekino kun la vasta auskultantaro!

—
* *La aŭtoro estas respondeculo de Esperanto-Sekcio de Radio Pekino.*

Amika renkontiĝo inter kolegoj de Radio Pekino kaj Radio Polonia



“LA MONDO”, monata organo de Ĉina Esperanto-Ligo, dulingva, ne multe konata eksterlande, en sia numero de januaro 1985, aperigis nian foton faritan dum E-ekspozicio sur la publika placo en Rueil, Francio. Apuda artikoleto klarigis nian agadon kaj nian deziron ricevi ekspoziciajn. Ĉe la foto aldoniĝis nia adreso, iom erara; tamen ĉio atingas nin bonorde dank’ al la lerteco de niaj poŝtistoj aŭ de nia loka famo. (Iam alvenis letero kun adreso: Zorka Rueil Francio).

Senprokraste venis leteroj de junaj, entuziasmaj Esperantaj lernantoj, kiuj proponas librojn, revuojn, poŝtkartojn ktp., sopiras al amikeca korespondado kaj scivolas pri la Esperanto-movado en okcidento, pri nia propra vivo ktp.

Pli ol kvardek gekorespondantojn ni havas nun. Kaj ne estas finite. Inter ili estas soldato, studentoj, oficistoj, manlaboristoj, kamparano. Tiu ĉi lasta ĵus skribis naŭ-paĝan leteron por esprimi sian entuziasmon por E. post sia speciala E-kurso en la Akademio de Sciencoj en Pekino. La plej juna estas HUI HUI, knabineto 6-jara. La plej maljuna estas 49-jara kaj instruas fizikon en mezlernejo. Iuj skribas ĉiunomate; aliaj malpli ofte. Ĉiuj nomas nin instruistoj, kun alta respekto pro nia granda aĝo. Ni provas kompensi kaj rekompenci ĉiun, ĉar ĉiu estas meritplena kaj ĉar neniam dum nia tuta Esperanta agado ni renkontis tiom da bonvolemo.

Ja Ĉinio estas vasta lando; ja ĉinoj estas inteligentaj, kuraĝaj kaj seriozaj homoj; ja la lando kaj la popolo evoluas; ja ĉiaj entreprenoj, industriaj kaj komercaj interpuŝiĝas por sub-

PRI NIA SPERTO



S-ino Zorka Enizan (la unua de dekstre) parolas kun ĉina esperantistineteto.

skribi kontraktojn kun tiu mondo.

Kaj ni? Kion ni faris kaj faras por ke evoluu nia entrepreno ESPERANTO en tiu lando, kies registaro, senprecedente tiom favoris kaj favoras la internacian lingvon? Ĉu ni esperantistoj neglektos la ŝancon de nia "entrepreno" en tiu mondparto? Certe ne!

Mi memoras pri miaj unuaj paŝoj en la Esperanta vivo, kiam mi estis absolute sola en mia bretona vilaĝo, ŝajne la nura tia stultulo en la mondo. Ofte mi pretis cedi al la moko kaj rezigni pri mia "stulta" entrepreno. La SAT-kongreso en Amsterdamo en 1948 min savis.

Miloj da junaj ĉinoj hodiaŭ troviĝas en la sama situacio kaj tie ne estas amsterdama kongreso, Ĉu ni estos senkulpaj, se ni nenion faros?

Nur unu poŝtkarto kun amikecaj vortoj povas savi junan esperantiston. Per tiu poŝtkarto,

kiun li montros al siaj ĉirkaŭantoj, li povos kontraŭstari iliajn mokojn kaj pruvi la utilecon de Esperanto. Per nia korespondado ni firmigis centojn en ilia lernado. Se vi deziras kontribui al tiu savado, vi povas doni al ni vian

adreson; aŭ se vi preferas, ni donos al vi adreson de ĉino.

Nia adreso: Ludoviko kaj Zorka ENIZAN, 44, strato Guionis, 92500 Rueil-Malmaison, Francio.

Ges-roj Ludoviko kaj Zorka Enizan en Anŝan, Ljaŭning-provinco



Germana frezisto

de LU BINSENG

Pasintjare, post la 70-a Universala Kongreso de Esperanto, ni ĉinaj esperantistoj el la redakcio de "El Popola Ĉinio" vizitis Duisburg, okcidentan urbon de FR Germanio. Tie ni konatiĝis kun la 47-jara germana frezisto Otto Nitsche, kiu afable gastigis nin. Li kaj lia frato aranĝis internacian vesperon, kiun partoprenis geesperantistoj el Ĉinio, Pollando, Bulgario kaj FR Germanio. Dank' al la Internacia Lingvo ni gaje pasigis la vesperon.

Dum la restado en lia hejmo ni estis intervjuitaj de ĵurnalistoj de Duisburg venigitaj de Otto. Tuj en la sekvanta tago jam aperis artikoloj pri la intervjuo. Dank' al lia afabla helpo ni havis honoron esti akceptitaj de urbes-


tro s-ro Josef Krings en la urbo-domo.

S-ro Otto Nitsche estas leganto de "El Popola Ĉinio" kaj tre amika al la ĉina popolo. Li ofte kontribuis al ĵurnaloj per artikoloj pri la amikeco inter Germanio kaj Ĉinio. Li ŝatas kontaktiĝi kun ĉinaj samideanoj. Antaŭ kelkaj jaroj Duisburg ĝemeliĝis kun la ĉina urbo Wuhan. Kiam la Duisburga delegacio estis en Wuhan en 1982, la tiea 49-jara mezlerneja instruisto Yang Chung-kun trovis la adreson de Otto en Esperanto-adresaro. Post la unua kontaktiĝo Otto kaj Yang multe korespondis. En la leteroj ili konigis sian landon kaj sian popolon. La 6-an de marto 1986 Waz, la plej granda ĵurnalo de la regiono, publikigis artikolo-

lon de Otto sub la titolo "Per Esperanto amikiĝis instruisto el Wuhan kaj frezisto el Duisburg", kun du grandaj fotoj.

Dum la 71-a UK kurantjare la frezisto renkontiĝis denove kun ni en Pekino. Kia ĝojo en tiuj tagoj! Ni babilis pri nia amikeco, pri la vivo de ambaŭ popoloj kaj pri nia lingvo mem. Kun plezuro Otto akceptis la inviton de EPC-fotisto kaj gastis en lia hejmo kune kun aliaj germanaj gesamideanoj. La vesperon ili pasigis agrable, sen lingvobaro. Ili skribis kortuŝajn vortojn sur memor-albumo de la gastiganto. Jes, Pekino impresis la freziston neforgeseble. "La ĉinoj vivas ne tiel riĉe kiel la germanoj, tamen ili estas kontentaj pri sia vivo, ĉiam kun ridanta vizaĝo," li diris.

S-ro Otto Nitsche (la dua de maldekstre) gastas ĉe EPC-fotisto. La unua de maldekstre estas la aŭtoro.



Novaj Libroj

eldonitaj de la

Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ĉina Antologio (1919 — 1949) (n-ro 10-Es-2064S) £ 6,40 US\$ 9,80

Kolekto de 55 noveloj, raportaĵo, eseoj kaj poemoj de la plej famaj ĉinaj verkistoj de tiu periodo, inkluzive de Lusin, Maŭ Dun, Bakin, Laŭ Ŝe, Ĝuo Moĵŭo k.a. La libro vive spegulas la socian vivon en la tiama Ĉinio.

Oranĝa Ombrello (10-Es-1979P) £ 1,10 US\$ 2,15

Kolekto de mikronoveloj montranta la ĉiutagan vivon de ordinaraj ĉinoj.

Gaŭ Ŝiĉji: Aŭtobiografio de Bakterio (13-Es-1982P) £ 0,90 US\$ 1,60

Per viglaj lingvaĵoj la aŭtoro priskribas la vivon de bakterio. Ĝi estas interesa popular-sciencia legaĵo.

Kuracaj Manĝaĵoj (15-Es-2047P) £ 0,65 US\$ 1,25

Receptoj de kuracaj kaj sanigaj manĝaĵoj.

Ĉinaj Familiaj Pladoj (15-Es-2061P) £ 1,10 US\$ 2,15

Receptoj de ĉinaj pladoj facile pretigeblaj en familio.

Tajĝiĉŭan (17-Es-2065P) £ 1,30 US\$ 2,50

Speco de ĉina tradicia luktarto. Kiel saniga gimnastiko ĝi taŭgas precipe por maljunuloj kaj malsanuloj.

Ĉinlingva Konversacio (9-CEs-2070P) £ 1,10 US\$ 2,15

Elementa kurso konversacia de la ĉina lingvo pri ĉiutaga vivo.

Gvidlibro pri Pekino (12-Es-2067P) £ 1,55 US\$ 2,85

Ĝi servas kiel helpanto al eksterlandaj gastoj en vizito al Pekino, konigante vidindajn lokojn, hotelojn, restoraciojn, trafikajn liniojn, gravajn telefonnumerojn ktp., kun mapo kaj koloraj bildoj.

Vojaĝo tra Ĉinio (12-Es-284P) £ 8,80 US\$ 12,50

Albumo pri 24 turismaj urboj de Ĉinio, kun koloraj bildoj.

Pejzaĝoj de Pekino (87-EsEC-535) £ 0,50 US\$ 0,95

Serio da koloraj poŝtkartoj.

Pejzaĝoj de Ĉinio (87-EsEC-534) £ 0,65 US\$ 1,30

Serio da koloraj poŝtkartoj.

Mendu ĉe UEA, perantoj de EPCĈ aŭ la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (**GUOJI SHUDIAN**), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

ABONU "EL POPOLA ĈINIO"!

Nun komenciĝas 1987-a abonvarba kampanjo por EL POPOLA ĈINIO. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1986 10 01 ĝis 1987 02 28), ricevos tradician ĉinan rulpentraĵon. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ABONTARIFO DE EPC

(Ekvalidas de 1-a de Oktobro)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	A\$	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugalio	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

VARBILON KAJ SENPAGAN SPECIMENON

NI SENDOS LAŬ PETO.

LA

ARKITEKTURO

DE KIOSKOJ

Teksto de ŜJE ŜJAŬJING
Fotoj de ŜEN ĈEN

Kioskoj montras antikvan arkitekturon de Ĉinio. Diversformaj elegantaj kioskoj videblas ĉie en imperiestraj palacoj, klasikaj ĝardenoj kaj famaj temploj, sur verdaj montoj kaj ĉe fluantaj riveroj.

En Ĉinio la plej fruaj kioskoj estis tiuj ĉe vojoj, kie povis ripozi pasantoj. Poste ili servis kiel ornamo de pitoreskejo kaj loko por ĝuigi pejzaĝon. Kioskoj havas formojn rondan, ventumilan, kvadratan, oblongan, sesangulan kaj okankulan. Krome, videblas ankaŭ kioskoj en opo. Iuj havas trabojn kun gravuraĵoj kaj pentraĵoj kaj aspektas imponaj, kaj aliaj konstruitaj el bambuo impresas antikvece kaj nature. La dispozicio de kioskoj kaj elekto de iliaj formoj estas grava konsistiga parto de la tuta aranĝo de pitoreskejo. La kioskoj montsupra, montdekliva, koridora, sur-laga k.a. estas konstruitaj laŭ malsamaj topografioj. La kioskoj per si mem estas vidindaĵo kaj kunfandiĝas kun la beleco de la naturo.




*La duobla kios-
ko "Geamantoj"*

Bronza paviloneto en la Somera Palaco






Kvadrata kiosko Foto de JAN ĜIN



Sesangula kiosko

Kiosko en formo de ventumilo



Indekso de EPC[^] 1986

	Nr.	pĝ.		Nr.	pĝ.
ESPERANTO					
POR LA 71-A UK					
1. La unua mesaĝo	1.	5	26. Hujucz kaj Esperanto	3.	6
2. Unua oficiala komuniko	1.	18	27. Profunde ni funebras pri s-ano Hujucz	4.	2
3. Vin atendas la hotelo Amikeco	2.	20	28. Adiaŭo al la restaĵoj de s-ano Hujucz en Pekino	4.	4
4. Dua oficiala komuniko	3.	18	29. Kondolencaj telegramoj kaj letero	4.	5
5. Ĉu vi deziras scii pri la aranĝoj de loĝado kaj ekskursoj dum la kongreso?	4.	40	30. En kaj ekster la Internacia Seminario de Bad Saarow	4.	24
6. Utilaj informoj pri Ĉinio	5.	19	31. Strebado de du generacioj	5.	14
7. Kongreso utila al la mondpaco	6.	2	32. Konkurso por teatraĵo de EVA	5.	22
8. Elkoran sonon al la 71-a UK	6.	3	33. Pledo por la terminologia laboro	6.	26
9. Xiyuan-hotelo volonte servos al vi	6.	24	34. Rekomendoj pri la landnomoj	6.	28
10. Saluto de la alta protektanto de la 71-a UK	7.	2	35. Vojo de Bakin, vojo de esperantisto	7.	25
11. Bonvenon al esperantistoj el diversaj mondpartoj	7.	2	36. Unesko firme subtenas Esperanton	7.	28
12. Kongresaj spektakloj plenaj de ĉinaj naciaj gustoj	7.	7	37. Nova ŝanco por terminologio	8.	10
LA 71-A UK					
13. Granda idealo kaj granda praktiko	11.	2	38. Kial kaj kiel mi volas esplori la ĉinan Esperanto-movadon	9.	23
14. Granda kaj celebrinda afero	11.	4	39. Renkontiĝo de esperantistoj en Lepsiko	10.	62
15. Esperanto — tutmonda fenomeno	11.	6	40. Internacia simpozio en Tokio	11.	69
16. Grandioza manifestacio de Esperanto	11.	9	41. Esp-movado en la nuna Ĉinio	12.	21
17. Signifaj programeroj	11.	14	42. Bona komenco de la kombino de Esperanto kun sciencoj kaj tekniko	12.	23
18. Facetoj de la 71-a UK	11.	18	43. Agrabla renkontiĝo	12.	26
19. Ĉinaj esperantistoj en UK	11.	22	44. Pri nia sperto	12.	29
20. Kiel ilin impresis la 71-a UK en Ĉinio?	11.	25	POR KOMENCANTOJ		
21. Kuraĝigo kaj espero	11.	28	45. Por savi infanon	1.	48
22. Ĉina gazetaro kaj UK	11.	48	46. Abeloj	2.	47
23. Naŭ belaj tagoj en Ĉinio	1.	16	47. Freŝa floreto sur la ĉina poezia scenejo	3.	25
24. Sporto kaj Esperanto	2.	25	48. Rivereto; Herbeto	4.	27
25. La nuna situacio de la ĉina Esp-movado	3.	2	49. Sennoma floro	5.	23
			50. Boato kaj fluanta akvo; Malbona fino de sorgo; Kanto kaj plumoj de pavo	6.	29
			51. Dankinda helpo	7.	62
			52. Deĵortabelo	8.	24
			53. "Kuracisto" en vagonaro	9.	30

	Nr.	pĝ.
54. Amikeco	10.	67
55. Germana frezisto	12.	30

SUR NIA LIBROBRETO

56. Egoismo kondukas al faŝismo	5.	22
57. Ni devas vivi bone	8.	8
58. Tri romanoj de István Nemere	9.	28
59. Iri al lumo de tie ĉi	10.	20
60. Sun Jatsen, granda revolucia pioniro de Ĉinio	11.	52

EKONOMIO

61. La "verda granda muro" en konstruado	1.	5
62. Reformado de alkala tero	1.	39
63. Atingoj de Ĉinio en la Sesa Kvinjara Plano	2.	2
64. La komercaĵa produktado de la ĉina kamparo en disvolviĝo	2.	6
65. Progresas la Ĉina Internacia Kredita kaj Investa Korporacio	3.	28
66. Ekonomiaj reformo kaj disvolviĝo en la ĉina kamparo	4.	6
67. Sur la tero de volontuloj-ekspluatantoj	5.	2
68. Kien iros la reformado de la ĉina ekonomia sistemo?	6.	9
69. Dolĉakva fiŝbredado en la "millaga provinco"	7.	43
70. Ĉefaj taskoj de la Sesa Kvinjara Plano de Ĉinio	8.	2
71. Ĉinaj urboj en disvolviĝo	9.	2
72. Ĉinaj vegetaraj pladoj	9.	66
73. Ŝoseoj en nordokcidenta Ĉinio	10.	2
74. En la hejmloko de la reĝo de floroj	10.	30
75. Vojaĝo en malriĉaj lokoj de Ningŝja	12.	10
76. Antaŭ 20 jaroj kaj hodiaŭ	12.	14
77. Post la bankroto de entrepreno	12.	17

MALFERMITAJ URBOJ

78. La antikva havenurbo Ningbo	1.	12
---	----	----

	Nr.	pĝ.
79. Nova havenurbo Bejhaj	2.	16
80. Hajnan — trezora insulo en la Suda Ĉina Maro	3.	14
81. Ĝuhaj, perlo ĉe la Suda Ĉina Maro	4.	20
82. Jingkoŭ — la dua granda pordo de nordorienta Ĉinio	8.	20

KULTURO, EDUKO KAJ SCIENCO

83. Postleciona laborado de ĉinaj studentoj	1.	43
84. Televida programo en Pekino	5.	27
85. Instruisto Mi	8.	41
86. La origino de la ĉina civilizacio	9.	15
87. Vojo de memlernantoj	11.	60
88. La Haleja kometo aperas refoje	1.	41
89. Titano — atleto el la metaloj	5.	45
90. Nova nutraĵo — selen-riĉaj manĝaĵoj	5.	45
91. Astronaŭtiko servas al la nacia ekonomio	7.	46
92. Rezervejo por makakoj	8.	26
93. Allogi birdojn — urĝa tasko	9.	18
94. La "Plano Ŝinghŭo" praktikata en Ĉinio	10.	5

ĈINLINGVA KURSO

Deknaŭa leciono: Mi partoprenas en la Kongreso de Esperanto	1.	67
Dudeka leciono: Loĝo	2.	67
Dudekunua leciono: En hotelo	3.	67
Dudekdua leciono: Kongresejo	4.	71
Dudektria leciono: Veturi per taksio	5.	67
Dudekkvara leciono: En magazeno	6.	67
Dudekkvina leciono: Viziti Pekinon	7.	66
Dudeksesa leciono: Adiaŭo	8.	67

LITERATURO KAJ ARTO

95. Hans Andersen en Ĉinio	1.	20
Hans Andersen en Ĉinio	2.	22

	Nr.	pĝ.		Nr.	pĝ.
96.			Dommastro for de l' okuloj (Mikronovelo)	1.	50
97.			Novicoj (Mikronovelo)	1.	49
98.			Kanto de la kvar sezonoj (Novelo)	2.	60
99.			Kaprico de la pluvo (Mikronovelo)	3.	65
100.			La plej kara . . . (Mikronovelo)	5.	26
101.			Post ŝafbatalo (Mikronovelo)	6.	16
102.			Lasta volo de urbestrino (Mikronovelo)	6.	66
103.			Hazarda ripetiĝo sub purpura acero (Mikronovelo)	8.	39
			Verda, ho vi, stel' (Kanto)	6.	5
			Ĝoja kunven' ĉe l' Granda Mur' (Kanto)	6.	7
104.			Du poemoj: La printempo; Pluvema soneto	12.	48
ĈINA LITERATURO					
105.			Belaj mitoj kaj legendoj de la antikva Ĉinio	9.	39
			Du antikvaj mitoj de Ĉinio	9.	41
106.			"Libro de Poezio", la unua kolekto de poemoj de Ĉinio	10.	39
			Birda kanto; Cidonio	10.	41
107.			Ora tempo por prozo (I)	12.	44
			Admonado de Zoŭ Ĝji al la reĝo Ŭejŭang de Ĉji pri akcepto de kritiko	12.	46
108.			Konkurso de malgrandaj pianistoj	1.	46
109.			La ĉina danca konkurso	2.	40
110.			Memore al la popolaj muzikistoj Nje Er kaj Ŝjan Ŝinghaj	3.	46
111.			Juna pentristo el kamparo	3.	58
112.			Tradicia ĉina arta trezoro — gravurita lakaĵo de Pekino	5.	36
113.			Teatro kun eminentaj artistoj	7.	63
114.			Ŝekspiro inter la ĉinoj	8.	13
115.			Ponto de arta interŝanĝo kaj kunlaboro	9.	62
HIGIENO KAJ SPORTO					
POR VIA SANO					
116.			Ok sanigaj ekzercoj (I)	2.	62
			Ok sanigaj ekzercoj (II)	4.	68
			Ok sanigaj ekzercoj (III)	6.	45
			Ok sanigaj ekzercoj (IV)	8.	29
			Ok sanigaj ekzercoj (V)	10.	65
			Ok sanigaj ekzercoj (VI)	12.	49
117.			Sekreto de longviveco	4.	15
118.			Tricent-jara apoteko Tongĵentang	6.	56
119.			Tjanĝin batalas kontraŭ neinfektaj malsanoj	9.	6
120.			Reviviĝis ŝiaj rekunigitaj fingroj	10.	8
121.			Doktoro Fang Ĉji	12.	40
122.			Korpokonstrua turniro de Ĉinio	1.	25
123.			Kreskis junaj sportistoj de Ĉinio	2.	10
124.			Fizikkulturo de ĉinaj laboristoj	3.	39
125.			Sporto beligas la homan figuron	3.	43
126.			La ĉina vejĉio kaj la internacia interŝanĝo de vejĉi-ludarto	5.	42
127.			Ĉina antikva piedpilkado	9.	31
128.			Reĝo de ĉigong-o	9.	42
129.			Konkurso inter junaj piedpilkistoj	10.	17
130.			Sport-kunveno ĉe la piedo de Tjanŝan-montaro	12.	2
SOCIA VIVO					
131.			Ĉinaj tradiciaj familioj frontas al novaj problemoj	2.	44
132.			La vivo de maljunuloj en ĉinaj urboj	4.	13
133.			Bela mozaiko de la kantona gejunula vivo	4.	10
134.			"Ĉasisto" el vasta arbaro	5.	47
135.			Originala kultura foiro	6.	40
136.			Tie ĉi parolas BYISK	6.	14
137.			Fragmentoj el amleteroj	8.	61
138.			Pri kio pensas la geknaboj?	9.	58
139.			Ili revenas en la socion	10.	25
140.			Ĝojo en korto de kamparana familio	10.	28
141.			Ilia aspiro	11.	62

HISTORIO, HISTORIAJ OBJEKTOJ

142.	Antikvaj ŝipoj de Ĉinio	1.	55
143.	En la "loĝejo de feoj"	2.	48
144.	Enigmo de la subtera palaco de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio	4.	60
145.	Argilaj militistoj de Ĉu-regno	5.	10
146.	Paleoantropologo Ĝja Lanpo	6.	58
147.	La kulturo de la antikva Djan-regno	7.	36
148.	Prifosado de Dadu, la ĉefurbo de Ĵian-dinastio	8.	36
149.	Antikvaj surrokaj bildoj de Ĉinio	12.	64

VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ**VOJAĜO TRA ĈINIO**

150.	Daljan bonvenigas vin	1.	31
151.	Ŝenjang — la frua ĉefurbo de Ĉing-dinastio	2.	31
152.	Kunming, printempa urbo sur altebenaĵo	3.	31
153.	Nova turisma urbo Ĉengdu	4.	32
154.	Ŝjamen iranta al la mondo	5.	6
155.	Bela monturbo Ĉongĉing	5.	30
156.	Tri gorĝoj de Jangzi-rivero	6.	30
157.	Ĉerivera urbo Uhan	7.	30
158.	Ĉengde, "ĉefurbo" norde de la Granda Muro	8.	30

TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ

159.	Trafiko sur la altebenaĵo	2.	50
160.	Nacimalplimulto en Tibeto	3.	50
161.	Pri moroj en Tibeto	4.	49
162.	Prosperas la tibeta merkato	5.	53
163.	Kulturado de nova klera generacio	6.	46
164.	Malkovro de misteroj de la "Monda Tegmento"	7.	50
165.	Vivo de ordinaruloj	8.	46
166.	Sur la tero de Guge-regno	9.	45
167.	Alpismo en la monta regno	10.	49
168.	Ŝantoŭ — hejmloko de elmigrintaj ĉinoj kaj speciala ekonomia distrikto	6.	20

TANGŜAN, DEK JAROJN POST LA TERTREMO

169.	Ĉu miraĝo?	7.	10
170.	Ili portas duoblan taskon	7.	17
171.	Familioj — spegulo de la urbo Tangŝan	7.	20
172.	Simfonio de la vivo	7.	22
173.	La rubanda parko de Ŝenjang	9.	10
174.	Suĝoŭ, malpez-industria centro el 2500-jara urbo	10.	10
175.	Vojaĝo en Fuĝjan (I)	11.	56
	Vojaĝo en Fuĝjan (II)	12.	57

AMIKECO KAJ INTERNACIA PROBLEMO


176.	Afriko batalas kontraŭ dezertiĝo	1.	64
177.	Moskva baletto floras en Pekino	3.	36
178.	Paco — celo kaj espero de la homaro	7.	40
179.	Homoj, riĉfontoj kaj medio	8.	58
180.	Brila perspektivo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Latin-Ameriko	10.	44
181.	Luciano Pavarotti en Pekino	11.	64

ALIAJ ASPEKTOJ

182.	Al la legantoj	1.	2
183.	Opinioj alte taksindaj	8.	65
184.	Du ĝenaj vortoj	9.	68
185.	Kelkaj proponoj	10.	66

ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO

186.	Legendo pri la birdo <i>feng</i>	1.	36
187.	Antikvaj pontoj	2.	36
188.	Islamo en Ĉinio	3.	48
189.	Ĉinaj pladoj	4.	66
190.	Dek famaj vidindejoj de Ĉinio	5.	39
191.	Ĉinaj klasikaj ĝardenoj	6.	36
192.	Pekino — kongresurbo de la 71-a UK	7.	4
193.	La teritorio kaj loĝantaro de Ĉinio	8.	56
194.	Pri la kvin famaj montoj de Ĉinio	9.	36
195.	Tradiciaj festoj de ĉinaj nacimalplimulto	10.	36
196.	Famaj budhismaj montoj de Ĉinio	12.	50





La Kvin Drako-kioskoj en Bejhaj-parko

Foto de LIŬ SIGONG

Okangula kiosko

Foto de ŜOŬ LJANG





Antaŭ la Naŭdraka Muro

EL REALA VIVO DE ĈINIO

Kun dormanta infano



En Bejhaj-parko

Fotoj de CAJ SIGJE



*Handikapulo
muskita*

Ĉiutage sennombraj ĉinaj kaj alilandaj turistoj sin amuzas en Bejhaj-parko, kio igas vivoplena la parkon kun historio de jarcentoj.

Ĉe tagiĝo maljunuloj du- aŭ triope venas al ĝi. Inter ili estas boksistoj, amantoj de la pekina opero, birdoamantoj kaj aliaj, kiuj montras siajn grandajn viglecon kaj intereson.


Ĉe sunleviĝo venas al ĝi gejunuloj unuj post aliaj. Bele vestitaj geknaboj kun buntaj balonoj iras en homamasoj. Kvazaŭ gaja fajro ili direktas miajn okulojn foren.

Mi vidas en homfluo okulfrapajn alilokajn kamparanojn kun valizoj, kiuj ĵus elvagōniĝis kaj rapidis al la parko. Ili, ordinaraj kamparanoj, promenas kun granda ĝojo en la parko, iama ĝardeno de imperiestro kaj liaj edzinoj.

Sidante sur ombrataj benkoj, geamantoj dolĉe flustras, kvazaŭ neniun ili rimarkus. Kiel multaj aliaj turistoj, ili kunportas fotoaparaton. Knabinoj en ĉarmaj vestoj kantas kaj ridas, fotante sian belecon kaj graciecon.

Revemaj turistoj kun granda plezuro remas sur la lago ĉirkaŭ Ĉjonghŭa-insuleto. Tiuj en cignoformaj boatoj sentas sin kvazaŭ en fabelo.

Mi promenas en la movoplena parko akompanata de senfina ĝojo. Ĉi tie mi kontribuas al niaj legantoj per kelkaj fotoj sur-loke faritaj.




Cignoformaj plezurboatoj



Avo kaj nepo




*"Mi altas pli ol
la Blanka Pagodo!"*




Por fariĝi sportisto






Birdoamantoj



Gejunuloj en "tuliloj"



Maljunaj geedzoj



D-ro Fang Ĉji

DA ŬEJ:

DOKTORO FANG ĈJI

Ni rakontos al vi kortuŝajn farojn de kardiologo Fang Ĉji, profesoro de Ŝjehe-hospitalo en Pekino.

Frue en la komenco de la 50-aj jaroj Fang Ĉji jam famiĝis en la medicinaj rondoj en- kaj eksterlandaj pro sia alta kuracarto.

Kun riĉa sperto pri kardiologio li profunde studis pri denaskaj kormalsanoj, malsano de koraj valvoj kaj koronaria kormalsano. En la 50-aj kaj 60-aj jaroj li publikigis dekelkajn traktatojn, kiaj "Studo pri sangodinamiko de reŭmatisma mitrala stenozo", "Kontraŭkoagula kuracado de akuta miokardia infarkto" k.a.

De 1976 ĝis 1980 li funkciis kiel konsilanto pri medicina studado de la Monda Sana Organizo, poste li membriĝis al la Speciala Komisiono pri Kardiovaskulaj Malsanoj sub la organizo. La Reĝa Societo pri Kardiologio de Britio invitis lin kiel sian korespondan membron. Li 17-foje partoprenis internaciajn simpo-

ziojn, vizitis 23 landojn kaj regionojn de Azio, Ameriko kaj Eŭropo.

Li estas konsilanto de la Ĉina Medicina Asocio kaj ĉefredaktoro de la "Ĉina Gazeto pri Kardiovaskulaj Malsanoj".

Li kuracis malsanojn por Maŭ Zedong, Ĝoŭ Enlaj, Ĝu De, Song Ĉingling kaj aliaj ĉinaj gvidantoj. Kaj krome, li faris tion ankaŭ por multaj ŝtatestroj. De 1962 ĝis 1965 li kvinfoje veturis al Indonezio por kuraci malsanon al Sukarno, la tiama prezidanto de Indonezio. En 1970 princon Souvanna Phuma de Laoso subite atakis miokardia infarkto. La laosa registaro petis nian urĝan helpon. Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj tuj sendis d-ron Fang al Laoso. Li kune kun fakuloj el sep landoj ellaboris projekton por urĝa savado kaj pro tio estis respektata de aliaj.

Kiu kuracas eminentajn personojn, tiu disfamiĝas kun sia faro. Fang Ĉji estas rigardata

kiel aŭtoritatulo en la medicinaj rondoj de Ĉinio. Ĉu li kuracas ankaŭ ordinarajn homojn?

Li certe kuracas. Fang Ĉji ĝuas renomon ankaŭ de alia flanko. Ĉiutage li kuracas kiel ordinara kuracisto. Kiam malsanulo venis, li afable traktas lin.

Foje, kiam finiĝis la deĵorhorro, apud li ankoraŭ sidis paciento en pelta jako kun la peltaĵinterno turnita eksteren, kiu estis maljuna paŝtisto de Interna Mongolio. Li diris, ke li malsaniĝis antaŭ multaj jaroj. Sed pro malriĉeco, li ne povis viziti kuraciston, nun li jam riĉiĝis kaj povas viziti kuraciston. Bedaŭrinde en la hejmloko oni ne resanigis lin. Tial akompanate de sia filineto li venis al Pekino post longa vojaĝo por peti helpon de la doktoro.

La maljunulo multe parolis kaj Fang Ĉji atente aŭskultis. Li ĉiam atente aŭskultas aliajn, ĉu altrangajn gvidantojn, ĉu eminentulojn, ĉu ordinarajn laboristojn kaj kamparanojn, eĉ se ili ne pa-

rolas pri sia malsano. Fang Ĉji palpis pulson al la maljunulo kaj poste ekzamenis lin surlite. "Ĉu tie ĉi doloras? Ĉu ankoraŭ estas sufokite?" Li konsolis la maljunulon: "La malsano iom prokrastiĝis, sed ne gravas. Ni faros ĉion eblan por kuraci vin kaj vi iompostiome resaniĝos."

Fang Ĉji preskribis recepton al la maljunulo kaj donis al li slipon kun la vortoj "Bonvolu veni ankoraŭfoje en la sekva semajno". La maljunulo kortuŝiĝis kaj kun larmoj en la okuloj longe premis la manojn de Fang Ĉji dirante: "Vere bona doktoro vi estas!"

Kompreneble, la maljunulo ne sciis, ke ĝuste tiu paro da manoj palpis pulson al multaj grandaj mondfamaj personoj kaj ekzamenis ilian sanon.

Dum dekoj da jaroj Fang Ĉji ĉiam restis fidela al la devizo: "Kuracisto devas egale trakti malsanulojn."

Foje venis al la hospitalo suferanto de septicemio. Li havis febron de 40 gradoj kaj lia liphaŭto tute detruigiĝis de la febro. Fang Ĉji injektis al li grandan kvanton da penicilino kaj streptomicino, sed vane. Li decidis apliki tre malfacile akireblan antibiotikon. Tiu medikamento estas sufiĉe multekosta kaj netrovebla en multaj hospitaloj. Li telefonis kaj biciklis al dekoj da medicinaj kompanioj kaj apotekoj en Pekino, fine li trovis ĝin kaj savis la klienton el morto. Tiutage li senripoze laboris 16 horojn kaj en la nokto pro troa laciĝo li rapide endormiĝis sur litkuseno de malsanulo metita en koridoro ĉe malsanula ĉambro.

Por savi malsanulojn el morto, li ofte laboras tagnokte. Li diris al siaj kunlaborantoj: "Ni kura-

cistoj devas ĉiam teni en la memoro, ke savi malsanulon el morto estas nia sankta devo. Nia profesio decidas, ke ni ne laboru nur 8 horojn, ĉar oni ne devas foriri post la okhora laboro lasante malsanulojn flanken."


Li vivas en komerca kvartalo de Pekino. Lia domo ripozas en kvieta kaj eleganta korto. Ĉirkaŭ la vasta korto staras eŭropostilaj domoj. Antaŭ ĉiu domo kuŝas malgranda ĝardeno kaj en la korto estas granda ĝardeno. Sed al la pensema Fang Ĉji mankas tempo por promeni inter ĝardenoj grandaj kaj malgrandaj. Ŝjehospitalo situas en strateto flanke de la movoplena strato Ŭangfuĝing, sed li malofte iras sur la strato.

Li pasigas tempon ĉefe en malsanula ĉambro, ambulatorio, laboratorio, malgranda oficejo kaj sur podio. Ŝajnas al li, ke ne ekzistas postlabora tempo, festa

tago kaj ferio. Li ĉiam tenas en la koro malsanulojn, kolegojn, laboron kaj karieron.

De 1976 ĝis 1983, Fang Ĉji sepfoje veturis al Ĝenevo por partopreni simpozion aŭ konsilantan kunsidon de la Monda Sana Organizo. La simpozio kaj kunsido estis plenaj de laboroj, sed kiam li havis iom da libera tempo, li ne ekskursis al la pitoreska Ĝeneva Lago kaj anstataŭe ekzamenis la sanon de laborantoj de internaciaj organizoj en Ĝenevo. Foje li senripoze ekzamenis dekelkajn homojn. Subite liaj fingroj ektremis kaj ne povis stabile teni la stetoskopon. Lin ekzameninte oni trovis, ke li suferas akutan prostatiton kaj havas febron de 40 gradoj. Li prenis nur du tablojdojn kaj ricevis injekton por mildigi la febron. Li denove prenis la stetoskopon kaj daŭrigis sian laboron.

D-ro Fang Ĉji en diagnozado



**“ĈINA-ESPERANTA
VORTARO” ELDONITA**

La nomita vortaro kompilita de la Ĉina Esperanto-Ligo estis jam eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi estas meze ampleksa, taŭga por tradukado, verkado, instruado kaj studado, kaj ankaŭ utila por la eksterlandaj esperantistoj, kiuj lernas la ĉinan lingvon. La vortaro kun pli ol 40 000 artikoloj estas la plej granda el la samspecaj vortaroj ĝis nun eldonitaj en Ĉinio.

VERDA MAJO EN ROMANO

Ĉina romano priskribanta la travivaĵon de la japana s-anino Verda Majo (1912-1947), fama internaciisma batalantino kaj semanto de la ĉina-japana amikeco, estis eldonita de la Literatura Eldonejo de Sandong. La biografia romano portas la titolon “Verda Majo”, kun 280 000 ĉinaj ideografiaĵoj en 16 ĉapitroj. Ĝi fidele kaj kortuŝe registris la neglatan, tamen gloran vivon de Verda Majo. Por verki la romanon, la aŭtoroj ges-roj Ĝang Jaŭen kaj Ĝou Heju vojaĝis al 14 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj por viziti ŝiajn iamajn kolegojn



La fondkunveno de la Gengĝou-a Esperanto-Asocio

dum pli ol du monatoj. Ili akiris riĉajn materialojn kiel fonton de la romano. La fama ĉina tradukisto Chun-Chan Yeh verkis antaŭparolon por la romano.

**ESPERANTO KIEL DUA
FREMDA LINGVO POR
ESPLOR-STUDENTOJ EN
SEP ĈINAJ ALTLENEJOJ**

En 1986 sep ĉinaj altlernejoj decidis elekti Esperanton kiel duan fremdan lingvon nepre lernatan de tiuj esplor-studentoj, kiuj aspiras magistrecon. Ili estas la Centra Ĉinia Instruista Universitato, la Hunan-a Universitato, la Orient-Ĉinia Instruista Universitato, la Hunan-a Instruista Universitato, la

Hubej-a Instruista Instituto, la Tjanĝin-a Fremdlingva Instituto kaj la Anhuj-a Universitato.

**ESP-ASOCIOJ FONDITAJ EN
HENGŜUJ KAJ ĜENGĜOU**

Post la 71-a Universala Kongreso de Esperanto fondiĝis Esp-asocioj en Hengŝuj, urbo de Hebej-provinco, kaj en Ĝengĝou, la ĉefurbo de Henan-provinco. La fondon de la Hengŝuj-a Esperanto-Asocio iniciatis la juna handikapulo s-ano Ŝjue Hong sub la aŭspicioj de la Scienc-teknika Asocio de la urbo. Al la stablo de la Ĝengĝou-a Esperanto-Asocio donis atenton la popola registaro kaj la Federacio de Soci-sciencaj Asocioj de la urbo. Vic-

En malpli ol kvardek jaroj li dediĉis sian energion al disertaĵoj aŭ verkoj de multaj homoj, kaj kiam ili estis publikigitaj, li neniam donis sian signaturon al ili. Alilandaj medicinistoj ofte skribis kaj demandis al li: “Ĉu vi ion bezonas?” “Mi persone ne-

nion bezonas, sed nia hospitalo bezonas novajn aparatojn. . .” Do, provilo de elektro-kardiografio, mezurilo de sango-dinamiko kaj aparato por kontroli la ŝanĝon de elektrokardio de grava malsanulo estis senditaj al la hospitalo. . .

La doktoro aĝas 66 jarojn. Por koncentri sian energion sur scien-can studadon kaj kuracadon, li abdikis vicestrecon de la hospitalo, rifuzis alies proponon, ke li funkciu kiel estro de la hospitalo, kaj tutkore okupas sin en la faka laboro.

urbestro de Ĝengĝoŭ, s-ro Doŭ Si-ĝong, ĉeestis la fondkunvenon je la 24-a de aŭgusto kaj, en la nomo de la urba magistrato, donis gratulajn vortojn al la esperantistaro de la urbo. Laŭinvite li funkcias kiel honora prezidanto de la asocio. La Unua Tekstila Fabriko de Ĝengĝoŭ volonte donos al la asocio subvencion en parto de ĝiaj aktivadoj kaj disponigos al ĝi kunvenejo.

VETERANA S-ANO FORPASIS

S-ro Kho Yok Siang, elmigrinta ĉino en Indonezio, kiu esperantistiĝis en 1919, mortis la 5-an de julio 1986 en la aĝo de 89 jaroj. Li estis unu el la plej fruaj esperantistoj en tiu lando kaj multe dediĉis sin al loka Esp-movado. En kelkaj indoneziaj gazetoj iam aperis liaj artikoloj cele al disvastigo de Esperanto.

GRATULOJ POR LA 71-A UK

Okaze de la 71-a UK en Pekino la redakcio de El Popola Ĉinio ricevis kun danko gratulojn de Esp-organizoj kaj esperantistoj de

Rumanio, Venezuelo, Francio, Pollando, GDR kaj aliaj.

ITALA INTERLINGVISTIKA CENTRO FONDITA

IIC fondiĝis en novembro 1985 kun la celo diskonigi la interlingvistikon kaj ĉefe Esperanton inter la italaj universitatoj, la gazetaro kaj la intelektularo. Ĝi malfermis la Bibliotekon de Interlingvistiko ĉe urba biblioteko apud Milano. Esperantaĵoj konsistigas 98% de la konservaĵoj, multaj el ili estas raraj. Ĝi estas la unua en Italio kaj malfermita por la studemuloj kaj la universitataj studentoj.

KONGRESO DE LINGVISTOJ EN 1987

La XIV-a Internacia Kongreso de Lingvistoj okazos inter la 10-a kaj la 15-a de aŭgusto 1987 en Berlino, la ĉefurbo de GDR.

La ĝenerala temo de la kongreso estas "Unueco kaj diferenceco en la nuntempa lingvoscienco laŭ disciplinaj kaj inter disciplinaj traktmanieroj kaj rezultoj".

La kongreso laboros en 6 plenkunsidoj, 19 sekcioj kaj krome havos ĉetablajn diskutojn.

FLORA FESTO EN RUEIL MALMAISON, FRANCIO

La 14-an de junio 1986 okazis bela flora festo en la urbo RUEIL MALMAISON apud Parizo.

La loka Esperanto-asocio, laŭ invito de la urbestro, partoprenis la defilon de kvardeko da florumitaj ĉaroj, kiuj veturis tra la urbo dum tri horoj. La foto montras Esperantan ĉaron, per kiu ges-anoj Ludoviko kaj Zorka ENIZAN diskonigis Esperanton vastskale kaj disdonis al la multnombra spektantaro kvin mil ekzemplerojn da flugfolioj pri Esperanto.

NOVA BULTENO APERAS

Tutmonda Esperantista Biblioteka Asocio (T.E.B.A.) ĵus aperigis la unuan numeron de sia BIBLIOTEKA BULTENO. En ĝi troviĝas artikoloj interesaj por ĉiu libro-amanto, aktualaj informoj bibliotekaj, rubriko terminologia kaj foje recenzoj. Ĝi aperas trifoje jare.

Krome oni informas, ke T.E.B.A. urĝe bezonas pliajn membrojn por efektivi siajn servojn, nome terminologia servo, konsila servo kaj aliaj.

La kovrilo de la ĉina romano "Verda Majo"



En flora festo en Rueil Malmaison



Ora tempo por prozo (I)

de MEJ ĜI

Ĉirkaŭ la 14-a jarcento a.K., en Ŝang-dinastio aperis en Ĉinio la plej fruaj skriblingvoj kaj iom poste la unuaj prozaj verkoj. La tiamaj prozaj verkoj dividiĝis en kvar grupojn. La unua grupo estas aŭguraj notoj sur testudaj ŝeloj kaj bestaj ostoj, kiujn oni trovis en Anjang de Henan-provinco en 1898. Tiuj notoj estis faritaj de la kortego de Ŝang-dinastio antaŭ pli ol 3 000 jaroj. La dua estas antikva libro, kia "Superaj Klasikaĵoj". Ĝi nombras dokumentojn, nomumojn, dekretojn k.a. de suverenoj de Ŝang-dinastio, kaj la lingvaĵoj estis malfacile kompreneblaj. La tria grupo estas skribaĵoj pri meritoj, premioj k.a. de nobeloj, kaj ĝenerale gravuritaj sur bronzaĵoj. La kvara grupo estas "Printempo kaj Aŭtuno". Fakte ĝi estas kroniko de Lu-duklando kun registritaj eventoj de Ĝoŭ-kortego, Lu-duklando kaj aliaj regnoj en la periodo de 722 ĝis 481 a.K. Sed la lingvaĵoj estas tro simplaj kaj fragmentaj, similaj al titoloj de la modernaj novaĵoj.

Post tio aperis unua prosperiĝo de la prozo de Ĉinio.

En la lastaj jaroj de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj la unuaj jaroj de la periodo de Militantaj Regnoj (ĉ. la 4-a jarcento a.K.) Ĉinio spertis agitantan transiron de sklavismo al feŭdismo. Dekadencis la sklavposedantoj-nobeloj, dume bienula klaso

iom post iom fortiĝis. En la komplikaj bataloj sur la terenoj de politiko, milito kaj diplomatio, por defendi siajn interesojn, ĉiuj klasoj kaj socirodondoj bezonis resumi historian sperton kaj lecionojn kaj demonstri siajn starpunktojn. Krome, la klasa polariziĝo formis novan socironдон el intelektuloj. Malgraŭ ilia komplika deveno, ĉiuj ili estis erudiciaj. Post longtempa aneksa militado, en la situacio de tendenco de unuiĝo de la teritorio de Ĉinio, intelektuloj estis alte taksataj de diversaj fortoj de la socio, regnestroj kaj korteganoj kolektis ĉe si multe da intelektuloj kiel subulojn. La intelektuloj, kvankam ne havantaj konkretan oficon, povis senĝene diskuti pri la ŝtataj aferoj kaj montri siajn opiniojn, ĉar ili reprezentis la interesojn de diversaj klasoj kaj socirodondoj, kaj sekve formiĝis karakterizaj skoloj. Ili disputadis, persvadis, instruis kaj verkis ĉiu sur sia propra starpunkto. En tio aperis la situacio de "Konkurado de Cent Skoloj", kaj sekve naskiĝis novtipaj prozaj verkoj.

La stato, en kiu aperis la prozaj verkoj, karakterizis la prozojn mem: Historiaj prozaj verkoj kun celo resumi la historiajn spertojn kaj eseoj de diversaj skoloj aperintaj en "Konkurado de Skoloj". Ilia apero kaj iom-post-ioma maturiĝo markis oran tempon de la ĉina prozo. Tamen la tiamaj prozaj verkoj ne estis be-

letraj, ĉar la historiaj notoj estis kronikaj verkaĵoj pri eventoj, kaj eseoj de diversaj skoloj estis filozofiaj kaj politikaj. Sed tiuj eseoj estis verkitaj en beletraj manieroj, kaj ili povas esti rigardataj kiel literaturaĵoj kun alta arta valoro.

Historiaj prozaj verkoj estis ankaŭ nomitaj kronikaj verkoj. Surbaze de grandnombraj historiaj arkivoj, kortegaj historigrafoj de la regnoj kompilis el ili librojn plenajn de politikaj, militaj kaj diplomaciaj eventoj de la regnoj kaj ankaŭ paroladoj de regantoj kaj konsilistoj. La tri plej sukcesaj el la historiaj prozoj estis "Zŭo Ĝŭan" (Kroniko de Zŭo), "Ĝŭo Ju" (Kroniko de Regnoj) kaj "Taktikoj de Militantaj Regnoj".

"Zŭo Ĝŭan" estas registraĵoj de gravaj eventoj en la periodo de 722 ĝis 454 a.K. La libro formiĝis en la komenco de la periodo de Militantaj Regnoj. Pri la verkinto de la libro estas pluraj konjektoj. Oni asertis, ke la verkinto estis Zŭo Ĉiŭming de Lu-duklando de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno. Estas ankaŭ iuj, kiuj opinias, ke la verkinto estis historiisto kaj prozisto en la unuaj jaroj de la periodo de Militantaj Regnoj.

En "Zŭo Ĝŭan" estas eminentaj artikoloj pri militado. Preskaŭ al ĉiu kampanjo la libro donas komenton pri la karaktero

kaj kaŭzo, ankaŭ la priskribo de la bataloj estas sukcesplena.

“Batalo inter Ĉji- kaj Lu-duklandoj ĉe Ĉangŝuo” estas multe legata eseo kun alia titolo “Caŭ Guj pri Milito”. En la komenco de la artikolo la aŭtoro per kelkaj vortoj priskribis la danĝeran situacion de Lu-duklando minacata de malamikoj. Militisto Caŭ Guj petis aŭdiencon ĉe la regnestro Ĝuangong kaj demandis lin, sur kiu li bazos la venkon de la milito. En la interparolo Ĝuangong diris, ke kvankam li ne povis propre zorgi ĉiujn kazojn, tamen li serioze traktis tiujn aferojn. Kaj tiam Caŭ Guj laŭdis lian politikon kaj asertis, ke Ĝuangong povas gajni la militon dank’ al la subteno de pli da popoloj. Post tio, kvardek vortoj vivece ampleksis la tutan proceson de la reatako, persekutado kaj venko de la armeo de Lu-duklando. En la fino de la artikolo Caŭ Guj komentariis la kialojn de la venko de la malforta Lu-duklando super la potenca Ĉji-duklando: “Militon decidis kuraĝo. Ĉe la unuafoja tamburado la armeo de Ĉji-duklando estas ekscitita je la kuraĝo. Ĉe la duafoja tamburado la batalvolo malfortiĝis, kaj ĉe la tria ĝi tute malaperis. La malamikoj perdis la batalvolon, dume ni, energioplenaj, gajnis la venkon.”

La artikoloj en “Zŭo Ĝuan” estas lertaj en priskribado de homoj kaj iliaj karakteroj pere de parolo kaj ago. Ĝi povas klare figuri personojn en kelkaj frazoj. Tion ekzemplas rakonto pri la fuĝo de Ĉong-er. Ĉong-er estis filo de Ŝjangong, regnestro de Ĝin. Ŝjangong persekutis la kronprincon Ŝenseng ĝis sinmortigo kaj nomumis alian filon Ŝjiĉi kiel kronprincon. Konsciinte sian danĝeran situacion, Ĉong-er fuĝis en Ĉji-duklandon. Regnestro Hŭangong de Ĉji edzigis

lin kaj donacis al li okdek ĉevalojn. Sekve Ĉong-er intencis enloĝiĝi en Ĉji-duklando. Sed liaj sekvantoj ebruiĝis lin kaj forportis lin de tie. Ĉong-er migris 19 jarojn ekster sia patrujo kaj fine revenis sian hejmlandon kaj fariĝis regnestro. La artikolo fidele priskribis la proceson de la ŝanĝiĝo de nobelido senambicia en heroon ambician kaj strebeman.

“Venko de Ĝeng Ĝuangong super Dŭan en Jan” bildigas tri personojn de malsamaj karakteroj. La artikolo rakontas pri la konflikto kaj intrigado por reganteo inter Ĝeng Ĝuangong kaj liaj patrino kaj frato. Kiam la patro de Ĝuangong estis en regado lia patrino Ĝjang intencis nomumi lian pli junan fraton Dŭan kiel kronprincon, sed ne sukcesis. Post kiam Ĝeng Ĝuangong surtroniĝis, Dŭan do komencis ekspansiigi sian influferon. Ĝuangong ŝajnis sin indiferenta por la faroj de la patrino kaj frato. Sed tuj kiam Dŭan ekribelis, li senkompate subigis sian fraton. En la rakonto la aŭtoro vivece bildigis la maljustan preferon kaj arbitrecon de Ĝjang, la arogantecon de Dŭan kaj insidemon kaj kruelecon de Ĝuangong. La priskribo de Ĝuangong estas tre sukcesa. Li intence toleris sian fraton fari krimon por atendi ŝancon ekstermi lin. Dŭan malvenkis kaj la patrino estis ekzilita. Ĝuangong ĵuris ke li volas vidi la patrinon nur transmonde. Sed poste li intervidiĝis kun la patrino en tunelo, kio plene malkovris lian hipokritan vizaĝon.

“Gŭo Ju” registris eventojn de Ĝŭo-kortego kaj ĝiaj dependantaj regnoj de 967-453 a.K. Ĝis nun oni ne povis indentigi la verkon. Oni konjektas, ke ĝia aŭtoro vivis en la unuaj jaroj de la periodo de Militantaj Regnoj.

“Gŭo Ju” registris historiajn faktojn kun akcento de paroloj. Pere de argumentoj kaj interparoloj de historiaj personoj en diversaj politikaj aktivadoj, klare montriĝis iliaj trajto, karaktero kaj politikaj tendencoj.

“Taktikoj de Militantaj Regnoj” estas kolekto de historiaj materialoj de la periodo de Militantaj Regnoj ampleksanta historiajn eventojn en 230 jaroj. La aŭtoreco ne estas identigita.

“Taktikoj de Militantaj Regnoj” ampleksas la batalojn inter la konsilianoj de la militantaj regnoj kaj koncernajn strategiajn dispoziciojn kaj persvadajn parolojn. Ĝi karakteriziĝas per lertececo en registrado de eventoj. Priskribante parolon kaj polemikon, la aŭtoro ŝatis troigadon kaj aldoni sian propran eksplikon, kio elokventigis la argumentadon. “Taktikoj de Militantaj Regnoj” notis multajn persvadajn parolojn, kiuj plene montris la ruzan retorikecon de la persvadistoj. Multaj artikoloj entenas grandan kvanton da belaj kaj vivaj vortoj ofte aranĝitaj en paralelismo, kio dotis la artikolon per agita forto. Kaj la artikoloj ankaŭ estis saĝe poluritaj ĝis plena rafiniteco. Estas “Admonado de Zoŭ Ĝji al Reĝo de Ĉji-regno pri Akcepto de Kritiko” el la ĉapitro “Taktikoj de Ĉji-regno”. La ĉiam legata verko estas nerefuteble konvinka pro sia alegoria rezonado.

En la “Taktikoj de Militantaj Regnoj” oni povas trovi, ke ĉiuj korteganoj kaj konsilianoj povis libere esprimi siajn opiniojn kaj argumenti pere de parabolo. Estas famaj paraboloj “Pentri Serpento kun Piedoj”, “Tragedio de Galinago kaj Rivermitulo” k.a., kiuj faris la admonadon pli konvinka.

La sukceso de la “Taktikoj de Militantaj Regnoj” estas ankaŭ

en sentoplana kaj rafinita priskribado de homoj. En la ĉapitro "Taktikoj de Jan-regno" estas historio pri murdisto Ĝing Ke. Kronprinco Dan de Jan-regno sukcesis fuĝi de Ĉin-regno en sian patrujon. Tiam Ĉin-armeo intencis aneksi Jan kaj la trupoj jam atingis la landliman riveron Jiŝuj de Jan. Kronprinco Dan volis malhelpi la invadon de la

malamikoj kaj sendis Ĝing Ke por murdi la reĝon de Ĉin. La plej emocia sceno de la rakonto estas adiaŭo honore al Ĝing Ke. Ĝing Ke estis ekironta, kaj la kronprinco Dan kaj la intimaj amikoj alvenis en blanka vesto por adiaŭi lin. Veninte al la rivero Jiŝuj, unu el liaj amikoj, Gaŭ Ĝanli ekludis muzikilon kaj Ĝing Ke ekkantis laŭ la takto.

La kantado fariĝis pli kaj pli tragika kaj emocia, ke ĉiuj ĉeestantoj ekploris. Ĝing Ke kantis plue: "Siblas vento super la frostata Ji-rivero, la bravulo tuj foriros sen reveno." La kantado fariĝis korŝira, ĉiuj adiaŭantoj montris grandan indignon kontraŭ la invadantoj. Ĝing Ke forveturis sen retrorigardo. La priskribo estas vere kortuŝa.

Admonado de Zoŭ Ĝji al la reĝo

Ŭejŭang de Ĉji pri akcepto de kritiko

Zoŭ Ĝji estas bela kaj alta. Iun matenon, li vestis sin antaŭ spegulo kaj demandis al sia edzino: "Kiu el ni, mi kaj s-ro Ŝju

en la norda parto de la urbo, estas pli bela?" La edzino respondis: "Certe vi. Ĉu s-ro Ŝju estas komparebla kun vi?" S-ro Ŝju

en la norda parto de la urbo estas fama belulo en Ĉji-regno. Zoŭ Ĝji ne kredis kaj demandis al sia kromedzino: "Ĉu mi aŭ s-ro



Ŝju estas pli bela?" La kromedzino respondis same kiel la edzino. La sekvantan tagon amiko venis viziti Zoŭ Ĝji, kaj tiu faris la saman demandon al la amiko kaj aŭdis similan respondon. En alia tago venis s-ro Ŝju mem. Zoŭ longe pririgardis s-ron Ŝju kaj opiniis, ke li estas malpli bela ol Ŝju. Li kaŝrigardis en spegulon kaj trovis, ke Ŝju estas multe pli bela ol li. Nokte li pensadis en la lito kaj venis fine al la konkludo: "Mia edzino tiel respondis pro tio ke ŝi amas min; mia kromedzino tiel laŭdis min pro tio ke ŝi timas min; dume mia amiko nur pro tio ke li deziras mian favoron." Kaj en la kortegano

go li diris al la reĝo Ŭejŭang: "Mi klare scias, ke mi estas malpli bela ol s-ro Ŝju. Sed mia edzino amas min, mia kromedzino timas min kaj mia amiko deziras ion de mi, do ili ĉiuj diris, ke mi estas pli bela ol s-ro Ŝju. Nun nia lando havas vastan teritorion kun 120 urboj. La tuta haremo amas vin; la korteganoj timas vin, kaj ĉiuj en la regno deziras vian favoron. Tiel rezonate, via reĝa moŝto estas izolita de la vero." Ŭejŭang samopiniis kun li.

Sekve Ŭejŭang faris dekreton: "Ĉu kortegano ĉu plebano, kiu vid-al-vide kritikos mian kulpon,

estos rekompencita per granda premio; kiu letere kritikos min, estos rekompencita per meza premio; kiu kritikos min antaŭ la publiko kaj la afero atingos miajn orelojn, estos rekompencita per malgranda premio." Ĉe la komenco post la publikigo de la dekreto la korteganoj konkure faris kritikojn kaj la kortego estis plena de homoj kiel bazaro. Post kelkaj monatoj kritikantoj malmultiĝis, kaj post unu jaro neniu kritikon oni povis fari. Informiĝinte pri tio, la regnoj Jan, Ĝaŭ, Han kaj Ŭej venis riverenci antaŭ la reĝo Ŭejŭang de Ĉji-regno. Jen venko super malamiko en kortego.

ŜENJANG BONVENIGAS VIN!

Por faciligi al diverslandaj esperantistoj viziton al Ĉinio, akceli kombiniĝon de Esperanto kaj turismo kaj fortigi la interkomprenon kaj amikecon de diverslandaj popoloj, la Ŝenjang-a Esperanto-Asocio komencis turismajn servojn kaj bonvenigas diverslandajn esperantistojn al Ŝenjang kaj aliaj urboj de Ĉinio.

Ŝenjang estas urbo kun historio de ĉ. 2 000 jaroj. Tie estas la Imperiestra Palaco de Ĉing-dinastio, la Norda Maŭzoleo, la Orienta Maŭzoleo, en kiuj konserviĝas granda nombro da objektoj uzitaj de imperiestroj de Ĉing-dinastio, kaj krome, tie trovi-

ĝas ankaŭ gravaj temploj de taoismo, taoisma centro de la Nordoriento, Tajĉing-palaco de Ĉing-dinastio kaj la sarira pagodo de Ljaŭ-dinastio, Ĉang'an-templo de Ming-dinastio kaj Ŝinle-ruino, loĝloko antaŭ 7 000 jaroj, en kiu elteriĝis diversaj objektoj antaŭ 7 000 jaroj. La Ŝenjang-a Esperanto-Asocio proponos Esperantajn interpretistojn kaj ĉiĉeronojn al turist-samideanoj en vojaĝo. La vojaĝkosto estas favora. Dum restado en Ĉinio la turistoj Esperantaj ne nur ĝuos belajn pejzaĝojn kaj historiajn restaĵojn kaj konos la vivon de la ĉina popolo, sed ankaŭ partoprenos en la lokaj Esperantaj aktivadoj. Bv. skribi al:

He Ĉingŝjue aŭ Ĝaŭ Ĉenghŭa

Ŝenjang-a Esperanto-Asocio

Tel.: 60363, Telekso: 80312

SYTTA CN, Telegrafia adreso:

6520 1-3 Ĉongŝanŝjilu-str.

Hŭanggu-distrikto, Ŝenjang, Ĉinio

DU POEMOJ

La printempo

*Post malvarmo kaj nebuloj
Ree brilas, jen, la sun',
Niaj nazoj, niaj kruroj
Ne plu fridas ekde nun.*

*Kun lotuso kaj lilio
Proksimiĝas varma temp'.
Tamen, estas nur kopio,
Tiel frua, la printemp'.*

*Sub teras', sur sovaĝvito,
Naboj** nur forpasis ĵus,
Ekaperis jam muŝido
Sin sunbani kun trouz'.*

*Kaj la birdoj flugmultopaj
Reen venas de l' tropik',
Metas ovojn mikroskopajn
Zumbestetoj kaj formik'.*

*Cia spiro surbirdkorte
Kantas, kantas kun pasi'.
Kokoj, du, disputas forte.
Kial? Jen, ne scias mi.*

*Meleagro flanke restas,
Ĝi ne ĝojas pro l' aranĝ'
Kaj krestpinto ĝia pendas
Mola, kia iu franĝ'.*

*Olda Hunĉjo, povra besto,
Ne kapablas jam pri maĉ'.
Oni, antaŭ Paska festo,
Ĝin submetis al vivaĉ'.*

*Kontraŭ kiu l' ofendato
Povus venĝi sin hodiaŭ?
Sub nazegon ĝian kato
Rekte venis bleki "miaŭ".*

*Sed ĝi kaptis nun kataĉon,
Skui ĝin komencis ĝi.
Super tuta babilaĉo
Flirte flugas papili'.*

*Gaje sur la strat' kunsaltas
Du knabinoj. Ho kares'!
Dio! Mi, jen preskaŭ haltas:
Flanken, ĉiu interes'!*

Pluvema soneto

*Mi izoligis kvazaŭ Robinsono.
Neniu venas frapi mian pardon.
Mi ŝlosis ĝin, ĉar sentis la bezonon
Nek mi pri iu. Do, en bona ordo
Kaj, pli feliĉa ol Deŭkaliono,
De l' tute inundota monda bordo,
Sur ŝipon prenis mi, al kor', duonon.
Nun, super mond', ni drivas kun agordo.*

*En van', amase, per almozopeto
Vi plendas, anoj de l' terfaŭn' drononta:
Surŝipen mi ne prenos eĉ besteton.*

*Ĉar ja sufiĉas nia nura paro —
Mi, trubaduro, ŝi, knabin' sen-dota —,
Ke sin rejaru, tute, la homaro.*

Elromanigitaj de C.D.

* Okaze de la centjara jubileo de la naskiĝo de George Topirceanu (1886-1937), rumana verkisto, koresponda akademiano, premiita de la ŝtato, ni publikigas tradukaĵon de du el liaj poemetoj.

** Naboj — la naŭ- aŭ dekdu-taga periodo en la komenco de marto, kiam interbatalas la malvarmo kaj varmo, antaŭ ol decida starigo de printempo.

Ok sanigaj ekzercoj (VI)

(Daŭrigo)

V. Ekzercado de la nazo

Fleksetu la dikfingrojn, duone pugnigu la ceterajn fingrojn kaj frotu ambaŭ flankojn de la nazeĝoj per la dorso de la dikfingroj po 10 fojoj de sub la okuloj ĝis ambaŭflanke de la naztruoj. En vintraj aŭ frostaj tagoj frotu almenaŭ 30 fojojn. Oni povas tion fari per ambaŭ manoj samdirekte, aŭ kun unu mano malsupren kaj kun la alia supren. Ĉiu fojo inkluzivas froton supren kaj malsupren.

A. Pinĉado de la akupunkturaj punktoj *jingŝjang*. Pinĉu la akupunkturajn punktojn inter la mezo de la ekstera nazlobo kaj la nazlipa sulko, ĉe la nazloboj per la dikfingro-pintoj aŭ dika kaj montra fingropintoj. Knedu kaj premu po 10-20 fojoj la akupunkturajn punktojn.

La masaĝo de *jingŝjang* estas utila al la loka sangocirkulo, pre-

vento kaj kuraco de nazmalsanoj kaj vizaĝa paralizo.

B. Frotado de la nazo. Tio povas stimuli sangocirkuladon en la naz-mukozo, plifortigi rezistpovon de la naz-mukozo kontraŭ malsanoj, preventi malvarmumon kaj riniton, humidigi la nazkavon kaj la naz-mukozon kaj normaligi ĝian temperaturon, kio povas malfortigi eksciton de malvarma aero al la pulmoj, tusadon kaj altiĝi malvarm-rezistpovon. Krome, la ekzercado estas utila al la rekreskado de la epiteliaj ĉeloj de naz-mukozo, prevento kaj kuraco de atrofia rinito, povas eksciti flarĉelojn kaj akriĝi flaradon.

C. Pinĉado de la akupunkturaj punktoj *jenĝong*. Premetu la akupunkturajn punktojn ĉe la filtrumo je 1/3 de supre per fingropinto. knedu ĝin po 50 fojoj en la direktoj dekstruma kaj maldekstruma kaj premu ĝin 20 fojojn per

la palpflanko de fingropinto.


Ekscito al la akupunkturaj punktoj povas vigligi la spiran centron, plifortigi spiran funkcion, inkl. de spir-frekvenco kaj spir-profundo, kaj per reflektado levi sangpremon. Tio estas efika al ŝokorezisto kaj plifortigo de la viscera sangocirkulado, plibonigo de sangoprovizo de la homa organismo, precipe al ekspansio de la cerbaj angioj, plibonigo de sangoprovizo de la cerbo. Sekve tio helpas preventi kaj kuraci la cerban anemion kaj hipotension. Krome, tio povas eksciti la cerban kortekson kaj tiel fari la homon energia.

Tio estas utila ankaŭ por kuraci apopleksion, komaton, svenon, frenezecon, infanan konvulsion, vizaĝan paralizon, ikteron, hidropson, brustoanĝoron, lumbodoloron k.a.


(Daŭrigota)



Frotado de nazeĝoj



1. La akupunkturaj punktoj *jingŝjang*



1. La akupunkturaj punktoj *jingŝjang*
2. La akupunkturaj punktoj *jenĝong*

Famaj budhismaj montoj de Ĉinio

de LAN ŜAN

Sur multaj famaj montoj de Ĉinio troviĝas temploj. Utaj-monto de Ŝanŝji-provinco, Emej-monto de Siĉŭan-provinco, Ĝiŭhŭa-monto de Anhuj-provinco kaj Putŭo-monto de Ĝeĝjang-provinco estas adorataj kiel kvar famaj budhismaj montoj pro surmontaj temploj. Legendo diras, ke la kvar bodisatvoj Manjusri, Samantabhadra, Ksitigarbha kaj Avalokitesvara faris budhisman aktivadon kaj enkarniĝinte predikis budhismajn sutrojn sur la montoj. Tial en pluraj dinastioj

oni konstruis kaj ekspansiigis surmonte templojn. Pro la vigla religia aktivado la kvar montoj fariĝis sanktaj lokoj por la ĉinaj budhistoj.

Utaj-monto (ĉinlingve signifiĝanta kvin terasojn) ricevis la nomon pro siaj kvin terasaj montpintoj, kies plej alta montpinto Norda Teraso 3 000 metrojn super la marnivelo estas la plej alta el la montoj de norda Ĉinio. La pejzaĝoj de Utaj-monto estas imponaj kaj belaj. Somere ĉie en


ĝi vidiĝas verdaĵoj kaj floroj kaj regas milda klimato. Tial ĝi estas ideala somerumejo.

Laŭ legendo, la bodisatvo Manjusri iam montris sian majestan aspekton sur la monto. La templo Pusading laŭdire estis lia loĝejo, tie li sin montris kaj predikis budhismon. Meze de la unua jarcento p. K., nelonge post enkonduko de budhismo en Ĉinion, sur la monto jam konstruiĝis temploj, inter kiuj pli ol 200 havis plej grandan skalon. Nun tie estas pli ol 40 temploj protektataj de la ŝtato. La ĉina registaro asignis specialan monon por ilin ordigi kaj ripari.

Preĝo en Baŭĝŭo-templo de Emej-monto



La blanka pagodo Sarira de Ta'jŭan-templo staras sur impona bazamento, kun ronda formo kaj simetria strukturo. Ĝi, 70 m. alta, estas simbolo de Utaj-monto. Interne de ĝia plej granda templo Ŝjantong estas kupra halo, 3 metrojn alta, antaŭ kiu staras du kupraj 13-etaĝaj pagodoj, ĉiu kun alto de pli ol 6 metroj. Ili konstruiĝis antaŭ pli ol 300 jaroj. En la templo Ŝu-ŝjang troviĝas statuo de la bodisatvo Manjusri rajdanta sur leono, kun alto de ĉ. 9 metroj. La templo Lŭohoŭ konstruiĝis memore al la naskiĝtago de Manjusri. En ĝia posta halo estas granda ligna lotusfloro kun niĉoj ene. En la niĉoj sidas 4 budhaj statuoj. La floro regata de homoj povas malfermiĝi. Ĉe la flora



La blanka pagodo Sarira en Ta'jüan-temple

malfermiĝo mirinde vidiĝas la budho-statuo. Tio estas granda spektaklo por turistoj.

Legendo diras, ke bodisatvo (Samantabhadra sur blanka elefanto venis al Emej-monto, tie li sin montris kaj predikis budhismon. Nun en la templo Ŭan-njan estas kupra statuo de Samantabhadra sur 6.2-tuna blanka elefanto kun ses eburoj muldita en 980 p.K. La muldaĵo havas alton de 7.3 metroj. En la templo kuŝas la Elefantolava Baseno. Laŭ legendo, la bodisatvo iam lavis tie la elefanton.

Emej-monto estas 3 100 metrojn super la marnivelo. En Ĉinio cirkulas onidiro "Emej-monto estas la plej ĉarma sub la ĉielo". Frue en la Orienta Han-

dinastio (25-220 p. K.) budhistoj starigis templojn surmonte. En Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) la monto jam fariĝis budhisma sanktejo. La nombro de la temploj sur la monto iam atingis 120, nun tie staras 36 temploj kun ĉ. 760 historiaj objektoj.

Plej alloge por la pilgrimantoj kaj turistoj estas rigardi la sunleviĝon, nubomaron kaj "budhan lumon" sur la Lumo-rigara Teraso de la plej alta montpinto Ĝinding de la monto. La "budha lumo" estas malofta natura spektaklo. La sunlumo en specifaj kondiĉoj formas tra vaporo kolorajn lumringojn, enprenas en ilin la siluetojn de rigardantoj sur la teraso kaj vidiĝas ilin en la monttalia nubaro.

Tio impresas fantazie la rigardantojn.

La naŭ montpintoj de Ĝiühüa-monto rigardataj de malproksime similas al prosperanta lotusfloro. Jam antaŭ longe tie estis temploj. En 719 p.K. Ĝin Ĉjaŭĝüe, parenco de reĝo de la regno Ŝinlŭo (la nuna Koreio), bonziĝis kaj tie vivis 75 jarojn. Post morto li estis entombigita sur la monto. Laŭdire lia karnokorpo estis simila al bodisatvo Ksitigarbha priskribita en la budhisma sutro, tial li estis rigardata kiel transformiĝinto de Ksitigarbha. Poste la monto fariĝis kultejo por bodisatvo Ksitigarbha. Budhistoj grandskale konstruis tie templojn, kies nombro atingis iam mil. Multe prosperis budhisma

aktivado surmonte. Nun konser-
viĝas pli ol 50 temploj kun ĉ.
6 000 budhaj statuoj.

La templo Hŭaĉeng konstruita
memore al Ĝin Ĉjaŭĝŭe nun fari-
ĝis la Muzeo de Historiaj
Objektoj de Ĝiŭhŭa-monto, tie
konserviĝas multaj raraj objektoj
donacitaj de imperiestroj, pat-
tra-foliaj sutroj, trezora horloĝo,
antikvaj kaligrafiaĵoj, pentraĵoj
ktp. Okcidente de la templo
troviĝas fertegol-tegmenta tem-
plo, la karnokorpa halo de
Ĝin Ĉjaŭĝŭe. Antaŭ la halo es-
tas 81 ŝtonaj ŝtupoj kaj interne
de la halo vidiĝas ruĝa sep-etaĝa
ligna pagodo. Legendo diras, ke
Ĝin Ĉjaŭĝŭe estis entombigita
sub la pagodo. Ĉiu etaĝo de la
pagodo havas ok ĉambretojn kun
diversgrandaj statuoj de Ksiti-
garbha.

Sur la monto estas alia trezoro,
t.e. sida statuo de Uŝja-bonzo en
la templo Bajusjgong. La bonzo
vivis en Ming-dinastio. Li sin
vivtenis per sovaĝaj fruktoj kaj
mortis je sia aĝo de 110 jaroj.
Liaj disĉiploj sidigis lian korpon
en grandegan vazon. Post 3 jaroj
oni malfermis la vaz-kovrilon kaj
trovis lian vizaĝon kvazaŭ viva,
poste oni faris lian karnokorpon
ora statuo kaj konstruis la tem-
plon por kulti la statuon. La nuna
statuo de Uŝja-bonzo kun
lotusfloro sur la kapo kaj en
bonza vesto sidas sur junka
kuseno.

Ĝiŭhŭa-monto prosperiĝis pro
la du famaj bonzoj kaj estas
unusola monto el la kvar famaj
montoj, kiu famas pro ilia
aktivado.

Putŭo-monto estas la plej
malgranda el la kvar montoj kaj
prosperiĝis plej malfrue, sed ĝia
influo estas granda. Ĝi situas sur
insuleto en la maro oriente de
Ĝeĝjang-provinco. La insuleto
havas areon de nur 12.76



La Mahavira Halo en Ĉijijŭan-temple de Ĝiŭhŭa-monto.

kvadrataj kilometroj. La plej alta
montpinto sur la insuleto estas
nur 291 metrojn alta super la
marnivelo. Laŭ legendo,
bodisatvo Avalokitesvara sin
montris tie, tial la monto ĝuas
famon kiel la aliaj tri montoj en
la budhisma historio kaj ĉe la
budhistoj. Tie oni kultas ĉefe
bodisatvon Avalokitesvara.

Laŭ legendo, en 916 p. K.
japana bonzo Kejgaku pet-akiris
de Utaj-monto statuon de
Avalokitesvara. Kiam lia ŝipo
preterveturis la monton sur la re-
venvojo al Japanio, li vidis
multajn ferajn lotusflorojn kaj
lia ŝipo ne povis veturi pluen.
Kejgaku opiniis, ke tio estas la
volo de Avalokitesvara ne
forlasi ĝin. Sekve, li konstru-
igis sur la insuleto la templon
"Neforlasa Avalokitesvara"

por kulti la bodisatvon. De tiam
Putŭo-monto fariĝis sanktejo de
Avalokitesvara. Dank' al la kon-
struado en diversaj dinastioj, la
monto havas pli ol 80 templojn.

La tri grandaj temploj Puĝji,
Faju kaj Hujĝji imponas sur la
insuleto, ĉiu kun statuo de
bodisatvo Avalokitesvara ene. La
neĝblanka jada statuo de
Avalokitesvara en la templo Faju
estas pli alta ol la homo. Ĝi por-
tas brilajn ornamaĵojn orajn,
arĝentajn, koralajn kaj agatajn.

Putŭo-monto estas kultata ne
nur de ĉinaj budhistoj, sed ankaŭ
ĝuas grandan famon eksterlande,
precipe en Japanio kaj sudorienta
Azio. En historio popolanoj kaj
budhistoj de Japanio, Birmo, In-
donezio, Tajlando kaj aliaj landoj
ofte vizitis kaj pilgrimis Putŭo-
monton.

REFORMADO DE LABORSISTEMO

En septembro, ĉi-jare Ĉinio publikigis kvar provizorajn regularojn pri reformado de laborsistemo, t.e. tiun pri praktikado de laborkontrakto en la ŝtataj entreprenoj, tiun pri varbo de novaj laboristoj, tiun pri eksigo de oficistoj kaj laboristoj malosbervintaj disciplinojn kaj tiun pri asekurado de senlaboraj laboristoj. Tiuj kvar regularoj ekpraktikiĝis la 1-an de oktobro.

La plej gravaj punktoj en la kvar regularoj estas la reformo pri varbado de novaj laboristoj, t.e. praktiki en la ŝtataj entreprenoj la regularon de laborkontrakto pri varbado de novaj laboristoj, nuligi la difinon, ke gefiloj povas labori en la unuo de siaj gepatroj post ties emeritiĝo, kaj ke la entreprenoj varbas kiel novajn laboristojn gefilojn de siaj oficistoj kaj laboristoj, praktiki publikan varbadon de novaj laboristoj kaj elekti pli taŭgajn post ekzamenado en moralo, intelekto kaj sano.

La kvar regularoj konsistigas gravan parton de la reformo de ekonomia strukturo en Ĉinio. Ilia praktikado havas grandan signifon en pluapaŝa disvolvado de la aktiveco kaj kreivo de la laboristoj kaj oficistoj, plifortigo de la vigleco de entreprenoj, plenumado de bezonoj de la disvolviĝo de la socialisma komerca ekonomio kaj antaŭenpuŝado de la socialismaj produktaj fortoj.

115 000-TONELA CISTERNŜIPO KONSTRUITA EN DALJAN

Komence de septembro, ĉi-jare 115 000-tonela cisternŝipo estis lanĉita en Daljan. La ŝipo estas konstruita por norvega kompanio. Tio montris, ke la ĉina ŝipkonstruado atingis la novan periodon de



Memlernantoj de Ĉingdaŭ

konstruado kaj eksportado de 100 000-tonelaj ŝipoj.

La ŝipo estas konstruita per la plej avangardaj teknikoj de ŝipkonstruado en la mondo, inkluzive de aŭtomata lokaliza sistemo, dank' al kiu la ŝipo povas alkroĉiĝi al platformo sen ankrado, de senhoma kajuto kaj satelit-pilota sistemo. La bonega funkcio kaj kvalito de la ŝipo estas laŭdataj de la ŝipposedanto.

La ŝipo, kun longeco de 260 metroj kaj alteco de 16-etaĝa konstruaĵo, estas konstruita en la Daljan-a Ŝipkonstruejo kaj navigos tien kaj reen inter la Olekampo de la Norda Maro kaj la eŭropa kontinento.

TEKNIKA EKSPORTADO DE ĈINIO

Jam tute ŝanĝiĝis la situacio, ke dum longa tempo Ĉinio nur importis teknologiojn tute sen teknika ekspoto. En la pasintaj kvin jaroj Ĉinio eksportis preskaŭ 50 teknologiojn, kaj en la daŭro de la dua duono de 1985 ĝis la unua duono de 1986 ĝi eksportis 14 teknologiojn kun kontrakta monsumo

de naŭ milionoj da usonaj dolaroj. La teknikoj estas ĉefe uzataj en medicino kaj industrioj elektrika, kemia kaj metalurgia.

Rilate al la industria teknologio, ekipaĵoj de malgranda hidroelektraro de Ĉinio estas eksportataj al Usono, Kanado, Peruo, Kolombio, Filipinoj kaj aliaj 14 landoj.

Koncerne la agrikulturan teknologion, Ĉinio eksportas teknologiojn pri sinteza disvolviĝo de agrikulturo, kiaj tiuj pri bredado de fiŝoj kaj salikokoj en dolĉa akvo, pri utiligo de metano kaj sunenergio kaj pri brikofarado. La teknologio pri hibrida rizo de Ĉinio estas jam aplikata en Usono.

SUPEREDUKA EKZAMENO POR MEMLERNANTOJ EN ĈINIO

Bone efikas la sistemo de supereduka ekzameno por memlernantoj, kiu prove ekpraktikiĝis en 1981. Ĝis la fino de la pasinta jaro en Pekino, Tjanĝin, Ŝanhajo, Ljaŭning, Ĝjilin, Hejlongĝjang kaj Ŝenŝji 15 fakoj ekhavis siajn diplomitojn, kies nombro estas 11 400.



Deka Monda Virina Flugpilka Ĉampionea Konkurso, en kiu la ĉina teamo gajnis la ĉampionecon. Pro tio ĝi fariĝis la unua teamo, kiu gajnis kvin sinsekvajn ĉampioneojn en mondpokala konkurso, monda ĉampionea konkurso kaj olimpikoj.

En la premiodona ceremonio la prezidanto de la Internacia Flugpilka Federacio deklaris, ke la Dekunua Monda Virina Flugpilka Ĉampionea Konkurso okazos en Ĉinio en 1990.

LA SEPA MONDPOKALA GIMNASTIKA KONKURSO

La 1-an de septembro, post 3-taga streĉa konkurso, la Sepa Mondpokala Gimnastika Konkurso finiĝis en la Ĉefurba Sporthalo de Pekino. Dek unu gimnastoj gajnis ĉiujn 36 medalojn.

En la individuaj konkursoj sovetaĵ gimnastoj gajnis 9 orajn medalojn kaj la ĉinaj 3. Ĉina sportisto Li Ning kaj soveta sportistino Oksana Omeliantĉik gajnis plenan poentaron respektive en ĉevalado kaj grundgimnastiko.

LA UNUA INTERNACIA LIBROFOIRO EN PEKINO

En la unuaj tagoj de septembro,

La ĉina kaj soveta teamoj en konkurso

Nun en 29 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de Ĉinio funkcias direkta komisiono por la superreduka ekzameno por memlernantoj. Sub la Tutlanda Direkta Komisiono de Superreduka Ekzameno por Memlernantoj funkcias 12 fakaj komisionoj, kiaj tiuj de ekonomia administrado, filozofio, la ĉina lingvo kaj la angla lingvo. Ilin gvidas 204 fakuloj kaj profesoroj.


Oni jam akumulis sufiĉe multajn spertojn en la laboro de superreduka ekzameno por memlernantoj. Tio koncentre manifestas la organikan kombinon de memlernado, socia helpo kaj ŝtata ekzamenado.

LA ĈINA VIRINA FLUGPILKA TEAMO REFOJE GAJNIS LA MONDAN ĈAMPIONECON

Septembre okazis en Prago la

La inaŭguro de la Unua Internacia Librofoiro en Pekino






Li Ning gajnis la oran meĉalon de la vira kunmetita konkurso en la Sepa Mondpokala Gimnastika Konkurso.

la Unua Pekina Internacia Librofoiro okazis en la Pekina Ekspoziciejo.

1 055 eldonejoj de 35 landoj, regionoj kaj internaciaj organizoj, inkl. de Argentino, Aŭstrio, la Germana Demokratia Respubliko, FR Germanio, Japanio, Kanado, Francio, Sovetunio, Anglio, Usono kaj 178 ĉinaj eldonejoj partoprenis

en la eksponado.

La ekspona halo kovris areon de 7 800 kvadrataj metroj kaj havis 361 standojn kun 50 000 specoj de libroj, el kiuj troviĝis la plej novaj eldonaĵoj de la plej famaj eldonejoj de la mondo. Kiel la organizanto, la Libra Importa kaj Eksporta Kompanio de Ĉinio havis mendejon en la halo.



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * Medicino-studentino dez. senpagajn librojn en itala, franca, latina lingvoj. Fulvio Scarpa, Fondo Versace Str. Nr. 24, I 89 100 Reggio Calabria, Italio.
- * 25-jara komencantino, instruistino en kristana lernejo deziras korespondi tutmonde pri biblio, katolika religio, aŭ aliaj temoj. Skribu al f-ino Susan Armstrong, 12327 Pacific Ave. 10 Mar Vista, CA 90066, Usono.
- * 37-j. fraŭlo deziras korespondi tutmonde pri vojaĝado kaj diversaj temoj esperante. Adr.: s-ro Kjell Randehed, Vangagatan 8, 252 60 Helsingborg, Svedio.
- * Przemyslaw Jankiewicz (25-jara fraŭlo), enamiĝinta al Esperanto kaj montoj, deziras korespondi tutmonde, Urz. Pocz. 63-400 Ostrow Wlkp.1, skr. poczt. nr. 60, Pollando.
- * Serĉas kontakton kun kolektantoj de E-stampoj kaj p.m.
 1. S-ro Mantrad Granitz, Ernst Schnollor Str. 87, 9091 Karl Marx Stadt, DDR.
 2. Elliu Kurt Guse, Gustrower Stabe 16, 2756 Schwerin, DDR.
 3. Bernd Haas, 6120 Eisfeld, Schwarzburger Str. 2, DDR.
 4. Peter Hauser, 9435 Erla, Karlsbader Str, 1A, DDR.

(Daŭrigo sur p. 67)

AMUZO


Profeto (magio)

Ludanto laŭvole eltiras 15 el la 54 pokerkartoj kaj dismetas ilin en tri stakojn ĉiu el kvin surdorse. La ludanto petas, ke iu el la rigardantoj memoru unu karton kaj diru al li, en kiu stako ĝi estas. La ludanto kunigas la tri stakojn da kartoj, denove dismetas ilin surdorse en tri stakojn de maldekstre dekstren kaj faras la saman demandon al la rigardanto. Ricevinte la respondon, la ludanto ripetas la samon triafoje. Jen la ludanto trafe eltiras la karton, kiun volas la rigardanto.

La magio, ŝajne mistera, fakte estas simpla. Ĝia sekreto kuŝas en tio, ke la ludanto, kunmetante la tri stakojn, ĉiufoje metas la stakon kun la karto, kiun la rigardanto volas, en la mezon. Post trifoja dismetado la tria karto, kiu kuŝas en la meza stako, estas ĝuste tiu, kiun la rigardanto volas. Kompreneble, la ludanto povas ŝanĝi ludmanieron, post kiam li lertiĝas en la manipulado.

Rimarkigu

Kvin erarojn sur la ciferplato.




(Solvo trovebla en ĉi numero)

Testo de Inteligenteco

En dezerto kuŝas du oazoj ronda kaj paralelograma (vd. bildon). Nun oni planas konstrui rektlinian fervojon, kiu devas trapasi la oazojn kaj dividi ilin en du egalajn partojn respektive.

Kiel konstrui la fervojon?



(Solvo trovebla en ĉi numero)

Enigmoj



1. Ĝi havas flavajn korpoharojn,
Ĝia blekado teruras bestaron.
Kvankam ĝi ne havas subulojn,
Oni nomas ĝin reĝo de 1' arbaro.

(Specio de besto. Solvo trovebla en ĉi numero)

2. Ĉirkaŭ bela fosto
sep-ok fratoj sidas.
Post plenkresk' disiĝas,
kaj la vest' ŝiritas.

(Specio de planto. Solvo trovebla en ĉi numero)

KARIKATURO



VOJAĜO EN FUGĴAN (II)

Teksto de **ŬEJ LJAŬ**

Fotoj de **ŜEN LONG**

CIVILIZITA URBO

Mi restis nur 24 horojn en la urbo Sanming.

Elvagoniĝinte, mi haste enbusiĝis. Apenaŭ la buso moviĝis, ĝi subite haltis. Kelkaj pasaĝeroj alkuris de malproksime. La ŝoforo atendis ilin pacience. Tio tuj sentigis al mi malrapidan ritmon kaj harmonian atmosferon en tiu malgranda urbo.

Sanming transiris antaŭ tri jaroj de urbo sub subprovinca re-

gistaro al tiu sub la provinca registaro. La urbo kun 150 000 loĝantoj havas nur unu aŭtobusan linion ĉirkaŭ si. En ordinaraĵ tagoj ĝia pitoreska parko Ĉjilinŝan havas, bedaŭrinde, malmultajn vizitantojn, ĉar en la urbo troviĝas preskaŭ neniu senlaboro. La loĝkondiĉoj de ordinaraĵ laborantoj en la urba registaro povas enviigi la meZRangajn kadrojn en la ŝtataj ministerioj en Pekino. Dank' al la facila trafiko oni povas aĉeti freŝajn marproduktaĵojn per sama monsumo


kiel en la marbordaj urboj. En la plej okulfrapaj lokoj, kiel en la stacidomo kaj aŭtostacioj, staras tabuloj, kiuj avertas alilokajn turistojn, ke ili respektu la higienajn kutimojn de la loko.

Iu gvidanto de la urbo fiere diris: "Spertinte la streĉecon kaj bruadon en marbordaj urboj de Fuĝjan, alilokaj turistoj venas al nia urbo kaj sentas sin kvazaŭ en paradizo."

La tiea medio tamen ne estas ĉio ideala. La urbo, kiel unu

Ljuŝuj-magazeno ĉe Longĝin-rivero en Longjan





La nova kajo de Ĉjüanĝoŭ, kiu povas akcepti 3 000-tonelajn kargoŝipojn

el la gravaj industriaj bazoj de la provinco, koncentris fabrikojn en siaj distriktoj. Rigardate de alte vidiĝas densaj fumoj leviĝantaj el dekoj da fumtuboj, kio iom malheligis la civilizitan urbon.

EN LA LOKO, KIE MI PASIGIS MIAN INFANECON

Kiam mi estis 10-jara, mi kun miaj gepatroj transloĝiĝis de Ŝanhajo al Longjan, monturbo en okcidenta Fuĝjan. Tiam Longjan estis tre malgranda gubernia urbo nur kun unu polvoplana strato, ambaŭflanke de kiu viciĝis malaltaj konstruaĵoj.

Tia stato daŭris dekkelkajn jarojn kaj preskaŭ ne ŝanĝiĝis, ĝis mi adiaŭis la urbon por viziti universitaton.

Tamen la ĉi-foja reveno al Longjan ege mirigis min. Tie aperis 11 nove konstruitaj stratoj larĝaj kaj puraj, malaperis la antaŭa malpura kaj kaduka strato. Sur Longĉüan-strato apud la ĉirkaŭurba rivero, kun larĝeco de 23 metroj kaj longeco de 600

metroj, estas vigla trafiko kaj multaj pasantoj. Flanke de la strato staras tetrinkejoj, glaciaĵovendejoj, magazenoj k.a. Ĉe la trotuaroj kreskas platanoj kaj soforoj, kaj la florbetoj ĉeriveraj plezurigas la okulojn. Trans la rivero troviĝas la parko Denggaŭ kun areo de 15 hektaroj. Tie verdas arboj, aromas herboj kaj murmuradas rivereto. Denggaŭ jam fariĝis loko ŝatata de la urbanoj. Post 5-6 jaroj Longjan enviciĝis inter la modernaj urboj kun rudimenta formo.

La ŝanĝiĝoj de Longjan ŝajnas subitaj, tamen raciaj. Longjan ja estas riĉa je mineraloj kaj la rezervokvantoj de ĝiaj karbo, fero, mangano, kalkŝtono kaj ŝvelinta grundo okupis la unuan lokon en la provinco. Kun ferma natur-ekonomio en la pasinteco, ĝiaj tekniko kaj industria produktado estis ege postiĝintaj, tial ĝi ne havis forton por ekspluati la naturajn riĉfontojn. Gvidate de la politiko vigligi ekonomion praktikata en la lastaj jaroj, Longjan malfermis sian pordon, la antaŭa ferma natur-ekonomio transfor-

miĝis en malferman var-ekonomion, kaj tiel rapide efektiviĝis ekonomia impeto.

VIGLA KONKURENCO

La Longjan-a Littuko-fabriko estis bone konata por mi. Tie mia patrino laboris. En la vizito mi miris, ke littukoj projektitaj antaŭ 20 jaroj nun ankoraŭ produktiĝas pogrando kaj, laŭdire, havas grandan debiton. Malgraŭ tio, mi dubas, ĉu tia prospero povas longe daŭri.

Mia vizito al la Longjan-a Tekstila Fabriko kreskigis mian dubon. La fabriko produktanta ĉefe tartanon kun mezlongaj fibroj kaj alispecajn ŝtofojn estis duone lama. En la laborejoj regis malvigleco, kaj multaj laboristoj ripozis hejme kaj ricevis nur minimuman salajron por vivteno. La ĉefa kaŭzo kuŝis en tio, ke la produktokvalito estas malalta, produktaĵoj monotonaj kaj malmodernaj kaj ne povas konkurenci en la merkato. Oni diris, ke nun la fabriko uzas pli multan

kapitalon por teknika reformado, ke ĝiaj produktaĵoj havu debiton kaj ŝanĝu sian situacion en la konkurenco.

En la Longjan-a Trikejo mi vidis alian scenon. La trikejo kun pli ol cent laboristoj montris nekredblan vivecon en intensa konkurenco inter la enlandaj trikejoj. Ĝia vendokvanto en la pasinta jaro atingis 800 000 jŭanojn (ĉ. 3.7 jŭanoj egalas al unu usona dolaro). Ĝi sukcesis ĉefe per rapide akiritaj novaj merkataj informoj. Ĝi dediĉis grandan forton al esploro pri deziroj de klientoj kaj pri moroj kaj kutimoj de diversaj lokoj por fasoni modajn vestojn. Ĝi ankaŭ petas siajn oficistojn kaj laboristojn atenti la fasonojn de siaj parencoj kaj amikoj kaj foti modajn fasonojn por materialo. Dank' al tio ĝi kreas 3-5 novajn produktaĵojn ĉiujare. Ĝiaj bonkvalitaj trikotaĵoj kun moda fasono ĝuas bonan reputacion inter klientoj. Ĝiaj produktaĵoj ne nur havas grandan debiton en siaj urbo kaj provinco, sed ankaŭ vendiĝas en Ĝjangŝji, Gŭangŝji kaj Gŭangdong.

LA CENTFLORA VILAĜO

Mi forlasis Longjan kaj veturis suden al Ĝangĝoŭ.

Ĝangĝoŭ kaj la urboj Ŝjamen kaj Ĉjŭanĝoŭ kaj iliaj 17 gubernioj estas kune nomataj "Ora Triangulo" pro la intima interrilato en geografio kaj ekonomio. La loko havas varmetan klimaton kiel printempo tra la jaro, abundan pluvon, fekundan grundon kaj disvolvitan ekonomion kaj estas konata kiel "lando riĉa je fiŝoj, grenoj, floroj kaj fruktoj".

Mi vizitis la Centfloran Vilaĝon, kiun oni rigardas kiel floran mondon. En ĉiuj kortoj, eĉ sur ĉiuj tegmentoj, kreskas diversaj

floroj. Oni bone kulturas ĉ. 2 000 speciojn de floroj, kiaj orkideo, kamelio, umeo, krizantemo kaj narciso, kiuj vendiĝas en 18 provincoj de Ĉinio kaj en dekelkaj landoj aziaj, afrikaj kaj eŭropaj. Ĉiujare pli ol dek-mil envazaj floroj kaj envazaj miniaturaj pejzaĝoj estas eksportitaj. La enspezo de la vilaĝo el florkulturado superis 1 500 000 jŭanojn. Pli ol 150 el la 800 familioj de la vilaĝo enspezas po pli ol 5 000 jŭanojn el florkulturado ĉiujare.

En la vilaĝo mi renkontis geedzan paron zorgeme stucantan. En 1985 ili konstruis malgrandan belan domon per 30 000 jŭanoj. Antaŭ ilia domo estas eleganta korto kun florbedo. En la vilaĝo troviĝas nemalmultaj tiaj domoj. La geedzoj, fieraj pri sia florkulturado, diris: "Florkulturado estas nia tradicia kutimo. Ĉiu vilaĝano posedas hereditan teknikon de florkulturado."

TEMPLO KAJ SEKULARA VIVO

En Ĉjŭanĝoŭ mi vizitis la faman templon Kajjŭan. Apenaŭ mi eniris en ĝin, mi aŭdis litanion ŝajne de cent bonzoj. Laŭ la voĉo mi aliris kaj trovis, ke la halo estas malplena kaj tie nur unu bonzo sidas kun krucitaj kruroj. La litanio kun cent voĉoj venis de diktafono en mano de la bonzo. Estis neatendite, ke elektraj aparatoj eniris ne nur en ĉinajn familiojn, sed ankaŭ en templon.

En la nunaj temploj ŝajne nerimarkite ŝanĝiĝis iuj nocioj. Sekulara vivo influas templojn tagon post tago. Ĉe la monto Guŝan de Fuĝoŭ ŝoseo, kiu iras de la montpiedo al la montsupra templo, kondukas gajajn turistojn al la templo, kio tute malordigis

la kvietan vivon de la bonzoj, kiuj tamen rapide adaptiĝis al la ŝanĝiĝoj kaj sin tenas amike al la turistoj. Al ĉi tiuj la bonzoj bone servas en siaj restoracio, manĝaĵ-vendejo kaj tetrinkejo.

MODERNA ŜJAMEN

Post duhora veturado per aŭto mi atingis Ŝjamen.

Mi iam travivis kvar jarojn en la urbo. Tamen mia imago ŝajne neniam povas sekvi la rapidecon de ĝia ŝanĝiĝo. La okulfrapa ŝanĝiĝo estas tiu de fasonoj. En la sekva tago, kiam mi promenis surstrate, mi trovis, ke Ŝjamenanoj beligas sin originale laŭ sia ŝato, kaj mi apenaŭ trovis personojn en same fasonitaj vestoj. Precipe junulinoj konkuras en ornamado kaj per tio beligas an-

En laborejo de la Ĝangĝoŭ-a Fabriko de Ladmanĝaĵoj



kaŭ la marbordan urbon. Krome, taksioj kaj aŭtobusoj navetas sur stratoj. Antaŭ miaj okuloj prezentiĝis moderna urbo en bunteco.

En Ŝjamen troviĝas distrikto, unu el la kvar specialaj ekonomiaj distriktoj plej frue starigitaj en Ĉinio. Nun tiu distrikto ekspansiis al la tuta urbo. Ĝiaj trafikaj kaj telekomunikaj instalaĵoj, haveno kaj turismaj lokoj estas en streĉa konstruado. El buldozoj, turniĝantaj grupoj kaj bruantaj homamasoj formiĝis vivaj bildoj. Ĉio estas plena de viveco. Pri la konstruado de la Ŝjamen-a Speciala Ekonomia Distrikto jam raportis nia revuo sub la titolo "Ŝjamen Iranta al la Mondo" en la 5-a n-ro, 1986.

NIGRA MERKATO KAJ INDIVIDUE MASTRUMATA EKONOMIO

Mi iom laciĝis de la streĉa intervjuo en sinsekvaj tagoj. En ĉarma vespero mi venis sola al la marbordo de Gulangju en la

haveno de Ŝjamen. Mi kuŝis sur plaĝo por iom ripozi.

Kiam mi kunfandiĝis kun la belega Gulangju, okazis malagrablaĵo: Iu mezaĝulo sidiĝis tuj apud mi sen saluti min. Apenaŭ mi leviĝis por evito, li pafis al mi misteran rideton kaj elprenis paketon el sia sino. Li zorgeme malvolvis ĝin kaj montris arĝentan moneron. Aĥ, li estas kontrabandisto. Mi forpelis lin per mansvingo kaj krio. Kun surprizo li rigardis min kaj kolere foriris.

En Fuĝjan mi vidis nemalmultajn kolportistojn, kiuj kontrabandis elektronikajn horloĝojn, diktafonojn kaj vestojn. La popola registaro severe malpermesis tian vendadon, ke malmultiĝis tiaj kolportistoj en la lastaj jaroj.

La ŝtato malpermesas nehonestan komercon kaj protektas individuajn vendistojn oficiale registritajn. Ambaŭflanke de stratoj servas multaj restoracioj entreprenataj de individuoj. Antaŭ restoracioj estas vitraj vazoj, en kiuj naĝas fiŝoj kaj salikokoj, kiuj

vekas la apetiton ĉe preterpasantoj. Ĝenerale tiaj restoracioj estas malgrandaj, sed puraj. Ili kontentigas siajn klientojn per bona servo.

En Ŝjamen troviĝas la fama malgranda kafejo Mejleĝja funkciigata de dommastrino kaj ŝia emerita edzo kiel helpanto. La kafejo kun areo de 16 kvadrataj metroj havas rondajn tablojn. Ĝi estas pura kaj bonorda.

La mastrino estas lerta en sia laboro. Ŝi diris: "Por bone prepari kafon oni devas atenti kuirtempon kaj aldoni iujn spicaĵojn por kontentigi diversajn klientojn." Kaj la kafejo aĉetis dekkelkajn specojn de kafo laŭ gustoj de klientoj. Ŝi ne scias fremdan lingvon, sed ŝi ofte petas konsilojn de diverslandaj klientoj, kiuj parolas la ĉinan lingvon, kio multe altigis ŝian teknikon. Laŭ la proponoj de klientoj en kaj eksterlandaj, la kafejo aĉetis elektran bakujon, vendas varmajn panojn kaj diversgustajn kukojn. Nun la kafejon vizitas ĉiam pli da gastoj ne nur ĉinaj, sed ankaŭ alilandaj.


Infana amuzejo en Sanming





Minĝiang-rivero ĉe sunsubiro

La urbo Longĵan






Paŝtistetoj



Kolektado de pektenoj
Foto de **JANG SUMIN**

La akvorezervejo Jong'an





Sur Uji-monto

Nova loĝdomo de kamparano en antaŭturbo de Ĝangĝoŭ

En la parko Ĉjilinŝan Foto de LI ĜUANGCUN





Surroka bildo de Hūašan-monto



La surroka bildo "Sovaĝa Bovo" de Hejšan-monto

ANTIĴVAJ SURROKAJ BILDOJ DE ĈINIO

Teksto de ĜJANG ĜENMING
Fotoj de GU JI

Surroka bildo de Tajŝji



La bildoj, desegnitaj aŭ gravuritaj sur roko, estas primitiva artaĵo kreita en la frua periodo de la homa socio. Ili troviĝas en 5 kontinentoj de la mondo kaj havas historion de dekmiloj da jaroj.

En Ĉinio, frue en la 5-a jarcento p. K. en la Libro de Riveretoj kun Komentarioj estis noto pri surroka bildo. Vaste dislokiĝas la antikvaj ĉinaj surrokaj bildoj. Oni jam trovis ilin en ĉ. 50 gubernioj de 14 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Ili plejparte vidiĝas en regionoj de la nacimalplimulto ĉe la landlimo kaj en la lokoj, kie loĝis la antikvaj nacimalplimulto.

La ĉinaj surrokaj bildoj dividiĝas en tri specojn: la unua estas pri homfiguroj, produktaĵoj de kultado de la antikvuloj al siaj prapatroj kaj dioj; la dua speco pri ĉasado kaj paŝtado, kiu vivece spegulas la primitivan vivon tiuflanke kaj estas la plej koncentra temo pri surrokaj bildoj en la stepo de norda Ĉinio; Kaj la tria

speco pri ofera ceremonio kaj superstiĉaj aktivadoj, kiu spegulas la antikvan primitivan religian aktivadon kaj ofte videblas en la surrokaj bildoj de Junnan-provinco kaj Gŭangŝji-a Gŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono.


La ĉinaj surrokaj bildoj kun riĉa enhavo kaj diversaj temoj koncernas ĉiujn flankojn de la vivo de la antikva homaro pri la suno, luno, steloj kaj nuboj en la kosmo, surĉiela Dio kaj surtera Dio-kultado en la koncepto de homaro, homoj, bestoj, domoj, tendoj, ĉaroj, vojoj, arboj, pafarkoj kaj sagoj, bronzaj tamburoj, fingrosignoj, piedsignoj kaj iom da signoj nekŝonataj. Sur la vasta stepo kaj arbara zono de norda Ĉinio la ĉefa enhavo de surrokaj bildoj estas pri animaloj, kion kaŭzis la primitiva ĉasado kaj paŝtado sur la antikva stepo de norda Ĉinio. Plejparto de la bildoj estas ĉevaloj, kaproj, tigroj, lupoj, kameloj, sovaĝaj bovoj, cervoj, hundoj, kiangoj,

vulpoj k. a. En suda Ĉinio la surrokaj bildoj ĉefe temas pri oferado kaj sorĉista aktivado, Interalie la plej grava estas pri homfiguroj, ekz. la surrokaj bildoj de Hŭaŝan-monto de Gŭangŝji, Cangjŭan kaj Malipo de Junnan-provinco; kaj la bestaj bildoj plejparte estas bubaloj, simioj, ĉevaloj, hundoj, porkoj k. a.

Laŭ analizo, la antikvuloj faris surrokajn bildojn por noti aferojn kaj esprimi siajn pensojn, ekz. per la bildoj de dioj ili petis ilian benon en evito de katastrofoj kaj garantio de riĉikoltoj. La granda kvanto da bildoj pri bestoj atestas, ke ili estis dependaĵoj de la antikvuloj en la vivo. La bildoj pri batalo notis la konfliktojn inter la triboj, markas la batalspiriton, venkon, kuraĝon kaj unuiĝon de la batalantoj. Kaj la bildoj pri danco montras ĝojon pro venko en ĉasado kaj celebrazon de gravaj aferoj.

La plej elstara verko estas "Paŝtado" de Ŝingdi de la Ŝingĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Re-

La surroka bildo de Cangjŭan pri vilaĝo (Kopio)






La surroka bildo de Jinŝan pri tigroj (Kopio)

giono. La paŝtisto rajdas sur ĉevalo, antaŭ kiu iras kaproj. La fono de la bildo estas montodeklivo, sur kiu prosperas du grandaj arboj. Malantaŭ la arboj radias

la duonsuno. La bildo kun klara kaj strikta strukturo montras tre belan pejzaĝon kaj ludas rolon de pastoralo malofte vidata en surrokaj bildoj.

La surroka bildo de Altaj pri ŝafaro (Kopio)



La surrokaj bildoj de Hŭaŝan-monto de Gŭangŝji, sur la kruta montmuro 250 metrojn super la akvonivelo de Zŭoĝjang-rivero, estas grandaj kaj imponaj. En la areo larĝa ĉ. 200 metrojn kaj alta 40 metrojn, imponas pli ol 1 800 bildoj. La plejparto el ili estas homfiguroj altaj de 0.3 ĝis 3 metroj. La homfiguroj kun preskaŭ similaj pozoj estis nudaj en ombroj. Rigardate de antaŭe aŭ de flanke iliaj brakoj leviĝas supren kaj kruroj kruciĝas kaŭrante. Ŝajne ili estas dancantaj. Sub la piedoj de la ĉefa figuro desegniĝas hundformaj bestoj. Ĉe la kapoj desegniĝas bronzaj tamburoj, suno kaj aliaj signoj. La ĉefa homfiguro, kompare alta kun spado ĉe la talio, estas tribestro. La tuta bildo brile kolorigita per ruĝa mineralo montras varman etoson kaj elspiras karakteron de la nacimalplimulto en suda Ĉinio. La esplorado montris, ke la surrokaj bildoj havas historion de ĉ. 2 000 jaroj.

La surrokaj bildoj de Cangjŭan kun speciala stilo estas simplaj

strukture. La homa korpo estas inverse triangula, la kvar membroj estas prezentitaj per kvar linioj, kiuj montras agojn de la homoj, kaj ne desegniĝas la kvin sensoroj sur la kapo. Tamen, kaj la dancado kaj la ĉasado estas versimilaj. Interalie estas bildo pri vilaĝo kun multaj homoj, kies sceno estas impona. La elipsa cirklo montras la limon de la vilaĝo, kie la domoj staras laŭ la vilaĝlimo, kaj la vilaĝanoj revenas hejmen, kvazaŭ muzikante

kaj alte tenante armilojn. Iuj el ili pelas bovojn kaj porkojn, aliaj tenas sagon kaj pafarkon en mano. Tiu ĉi bildo estas odo pri venko en milito.

La surrokaj bildoj de Tajŝji en Hŭaan-gubernio de Fuĝjan-provinco apartenas al la kulturo en la tempo, kiam la antikvaj ideografiaĵoj anstataŭis la antikvajn bildojn, tial koncernaj fakuloj nomis ilin "bildaj ideografiaĵoj" kaj studas pri ilia senco.

La surrokaj bildoj de Ĝjang-ĝjun-klifo de Ljanjungang en Ĝjangsu-provinco estas gravuritaj sur ebena nigra roko, 20 metrojn super la marnivelo, 22 metrojn longa kaj 15 metrojn larĝa. Sur ili vidiĝas homoj, plantoj, birdoj, bestoj, steloj kaj nuboj, interalie la ĉefaj estas homvizaĝoj, kiuj troviĝas sur plantidoj kaj aspektas kiel iliaj fruktoj. Ili eble estas kreskaĵoj en kultado de la primitiva agrokulturo kaj terkultado.

KORESPONDI DEZIRAS

(Daŭrigo de p. 55)

5. Chamas Gerlach, Clara-Zetkin-Strabe 4, 9374 Gelenau, DDR.
 6. Andrea Laudel, Dresden Strabe 154, 9075 Karl-Marx-Stadt, DDR.
 7. Jens Schmidt, 2000 Neubrandenburg, Otto-Lilienthal-Strabe 16, DDR.
 8. Hana Vaškova, Blevice 38, 27328 Zakolany, ĈSSR.
- * S-ro Habib-ur-Rahman, 553, O/S Pak Gate, Multan-o, Pakistano, dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj kaj kolekti b.k.
- * 44-j. librobindisto dez. kor. kun ĉinaj geesp-istoj, interŝ. p.m. Rheinauer Ring 121/1, D-7550 Rastaff, FR Germanio.
- * 14-j. Szydlos Barbara dez. kor. kun geknaboj, Adr.: ul. Staromiejsko. 41-800 Zabrze, Woj. Katowice, Pollando.
- * S-ro Ron Ogram (100 Crerar Avenuo, Otavo, Ontario, Kanado, KIZ-7P2) mortis en 29-a de junio pro kormalsano. Bonvolu ne plu sendi leterojn al lia adreso nek atendi respondojn al viaj antaŭaj leteroj.
- * Novaj esperantistoj, kiuj finis

e-kurson, serĉas korespondantojn:

1. S-ino Duŝanka Lazic (Profesorino de marksismo), Save Ŝumanovica 46, Yu-22240 Ŝid;
 2. Neŝkovic Bratislava (pensiita instruistino), Borisa Kidriĉa 5, Yu-22240 Ŝid;
 3. S-ano Mitrovic Slobodan (studento de medicino), Branka Radiĉevica 63, Yu-22240 Ŝid;
 4. S-ino Gordana Milivojevic (prof. de itala kaj angla lingvoj), Nikole Vlaŝkog 98/100 stan 12, Yu-22240 Ŝid;
 5. S-ano Banjeglavic Stanislav (pensiita bankoficisto), Borisa Kidriĉa 52, Yu-22240 Ŝid;
 6. S-ino Ljiljana Lukic (prof. de jugoslavia literaturo), Save Ŝumanovica 17, Yu-22240 Ŝid.
- * 20-j. Filotas Antal dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj. Adr.: Boszorkany ut 2, 7624, Pecs, Hungario.
- * 22-j. fraŭlo dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj. Naser Kamali, Tohid Square, Taebodi Place, Poŝtkodo 91398, Hamid Jewelry, Mashhd, Irano.
- * 69-j. Martin Vilgotsson dez. kor.

kun ĉinaj esperantistoj. Adr.: Brogatan 15, 669 00 Deje, Svedio.

- * 29-j. Wolfgang Kirschstein, dez. kor. kun ĉefe ĉinaj junuloj pri literaturo kaj muziko Klasika. Adr.: Zyllanda Alle 11. 3. TV. Dk-8000 Aarhus c, Danlando.
- * 30 junaj esperantistoj (15-20 jaraj) korespondos pri ĉiuj temoj tutmonde. Esperanto-Klubo, Palac Mlodziezy, ul Ogarna 56 Gdansk, Pollando.
- * Serĉas kontakton kun kolektantoj de E-stampoj kaj p.m.
1. Ivana Kolembusova, Horhe Chlebany 75, 955040 Kr. Topolĉany, ĈSSR.
 2. Kafja Sterzl (18-j.), 1330 Schwedt, Bartelstr. 4, DDR.
 3. Hannelore Lau, 7063 Leipzig, Saturnstrasse 25, DDR.
 4. Helga Peifschner, 3080 Magdeburg, Lienhardstr. 5, DDR.
- * Csaszar Sandor dez. kor. kun samideanoj kaj samideaninoj el Hongkongo. Adr.: Voros H, ut 92, 11. 18. Szekesfehervar, H-8000, Hungario.
- * Volas korespondi kaj interŝanĝi bkjn, metiajn produktojn, artaĵojn tutmonde. Ŝ.E.G-Gamshidy, P.O.Box 46, Shahin-shahr, Isfahan, Iran.

LUCKY-FILMOJ

TRE UTILAJ POR VI!



乐凯胶卷给您留下幸福的回忆



化工部第一胶片厂

中国保定

电话: 37901 37902

电报: 5231

La Unua Filma Fabriko sub la Kemi-industria Ministerio de Ĉinio estas la plej granda fabriko, kiu produktas plurspecajn filmojn kaj magnetajn materialojn. Ĝiaj produktaĵoj estas uzataj en kinematografio, televizio, kulturo, eduko, nacidefenda industrio, astronautika telegvido, medicino, presado, fotado k.a. Estas pli ol 70 specoj de

Unua Filma Fabriko sub la

Kemi-industria Ministerio de Ĉinio

Baŭding, Ĉinio

produktaĵoj, el kiuj tri oni premiis per ŝtata arĝenta medalo, 12 oni titolis elstaraj produktaĵoj de Hebej-provinco. aŭ la nomita ministerio kaj 12 oni vendas en 12 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo kaj Afriko.

Bonkvalitaj kaj bonvenaj estas la koloraj kaj pankromataj Lucky-filmoj de ĉiaj normoj.

Telekso: 5231

Tel.: 37901 37902

BRONZA VAZO KUN DESEGNOJ

Teksto de FANG GŬOGIN

Foto de HU ĈUJ

La Okcidenta Ĝoŭ-dinastio (11-a jc. — 771 a.K.) estis prospera periodo de la sklava socio de Ĉinio. La bronza kulturo estis reganta kulturo tiutempe. Por la bezono de sklavoposedantoj oni faris multajn bronzaĵojn ofervazojn kaj vivnecesaĵojn. La vinujo

bronza vazo kun desegnoj estis tipa ĉe la komenco de la dinastio.

La vazo kun alto de 22 cm. kaj larĝo de 17.5 cm. havas rondan profundan ventron. Ĉe la supro estas verŝilo kun pinta vosto. Ambaŭflanke de la verŝilo staras po

unu koloneto kun ronda supro. Ĉe la supra parto de la ventro estas tenilo en formo de bova kapo kun etendita lango. La vazo surhavas belajn desegnojn. Kiel valora bronzaĵo, ĝi konserviĝas en la Imperiestra Palaco en Pekino.



Bronza vazo kun desegnoj

Foto de HU ĈUJ

